Kristana Esperantista
Ligo Internacia
(KELI)

Tre estimata legonto,

dankon pro via intereso konatiĝi kun ĉi tiu preĝlibreto. Ni petas, ke vi ankau legu la flavajn informojn je la fino de la libreto.

Per via komputila serĉilo vi rapide trovos la unuopajn tagojn, ekzemple per serĉado de “31.7.“

Dio benu vian preĝadon


Preĝo
por
ĉiu
Tago
Jelly Koopmans-Schotanus

Noveldono 2007 prizorgis:

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
fondita en 1911
**Celo:** Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.
**Organo:** DIA REGNO, fondita en 1908
dumonata revuo.
**Kontakto:** La sekretario (vidu sube)
**Interreto:** www.chez.com/keli

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o.,
Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Mendebleco** ĉe la sekretario de KELI
Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
💻 Cea.polnicky@quick.cz

Per via mendo vi subtenas
la porblindulan agadon **EVIDENTE**
de Jacques Tuinder, NL

# PREĜO

# por

# ĈIU TAGO

**kompilita de**

**Jelly Koopmans-Schotanus**

**(1919 - 1998)**

**membrino de la Ekumena Komitato**

**de KELI kaj IKUE**

**Leiden 1969**

4-a eldono 2007

reeldonita kun afabla permeso de ŝiaj infanoj
Benata, Donita, Feliĉa kaj Espero Koopmans.

reviziita de Siegfried Krüger
kaj Albrecht Kronenberger

**1.1.** Mia Patro, renovigu ĉe la komenco de la nova jaro ĉion en mi. Faru malnovajn devojn por mi novaj. Renovigu mian amon kaj kredon, kaj donacu al mi la sopiron al nova ĉielo kaj nova tero, kie regas justeco.

**2.1.** Eterna Patro, mi petas Vian helpon pro Via graco. Ne lasu nin sen ŝirmo en ĉi tiu mondo. Ni sentu, ke fajra muro ĉirkaŭas nin. En Via gardo mi estas sekura kaj konsolata.

**3.1.** Kompatema Patro, mi promenu en sankta respekto antaŭ Via vizaĝo. Mi sentu ĉie Vian ĉeeston. Kaj mi ekkonu en ĉiaj aferoj Vian providencan amon. Estu kun mi, kie ajn mi iru, kaj benu miajn proksimulojn.

**4.1.** Mizerikorda Dio, helpu min en la batalo kontraŭ miaj tentoj kaj donu, ke la venkanta standardo de mia Savanto flirtu super ĉiu batalkampo. Faru min bona sekvanto de Kristo.

**5.1.** Patro de ĉiu vivo, donacu al mi abundan amon por ĉiu, kiun mi renkontas. Liberigu min de ĉiu ŝanceliĝo. Ĉio en mi laŭdu Vian sankt-an nomon. Donu al mi la fortojn de la eterna vivo.

**6.1.** Savanto de la mondo, mi preĝas por ĉiuj, kiuj laboras por la disvastigo de Via regno. Elverŝu Vian benon super ĉiuj, kiuj atestas pri Vi inter malriĉuloj kaj perditoj, inter potenculoj kaj simpluloj, en ĉi tiu lando kaj sur la tuta tero.

**7.1.** Patro, grandigu mian koron kaj riĉigu mian amon, por ke mia vivo similu al ombro-riĉa arbo, kie lacaj promenantoj trovas ripozon kaj refreŝigon.

**8.1.** Mia Patro, mi preĝas al Vi por ĉiuj fami-lioj. Gepatroj kaj iliaj gefiloj donu al la mondo la bonan ekzemplon de harmonia vivo. Faru el niaj familioj benantajn fontojn de vivanta akvo.

**9.1.** Ĉiela Patro, mi dankas Vin pro ĉio. Mi ĝoje proksimiĝu al Vi kiel al la vivanta fonto, el kiu mi povas ĉerpi ĉion en la nomo de Kristo, mia Savanto. Via abunda graco estu kun mi kaj la miaj.

**10.1.** Korfavoru min, ho Dio, kaj montru al mi, kio estas mia plej danĝera peko. Helpu min batali kontraŭ ĝi. Fortigu min per Via graco.

**11.1.** Mia Patro, donu ke mi havu hodiaŭ bonan influon je aliaj. Mi ne estu ĝeno por serĉanta homo, sed ĉiu, kiun Vi metos sur mian vojon, venu pli proksime al Vi.

**12.1.** Dio de la lumo, lumigu mian spiriton. Pribrilu ĉiujn mallumajn angulojn de mia koro kaj faru min infano de la lumo, por ke mi povu transdoni tion al aliaj. Mi malamu miajn malbonajn sopirojn. Kreu al mi puran koron.

**13.1.** Mia Patro, konduku nin sur la vojo de la vivo. Montru al ni, ke la larĝa vojo gvidos al sklaveco kaj malbonaj sopiroj donos eternan ĉagrenon. Helpu nin ĉiujn ekkoni la bonon kaj ami ĝin.

**14.1.** Ĉiela Patro, donacu al mi la certecon de Via apudesto. Mi tiel vivu antaŭ Vi, kvazaŭ mi vidus Vin antaŭ miaj okuloj. Mi neniam dubu pri Via bonvolemo, kaj vastigu en mi la konvinkon, ke kun Vi ĉirkaŭas min la fortoj de la eterna vivo.

**15.1.** Ho mia Patro, ĉio estas ebla al tiu, kiu kredas. Sinjoro, pligrandigu nian kredon. Ni venku ĉiujn malfacilaĵojn per trankvila fido. Fortigu nin per Via forto por niaj vivotaskoj. La montoj de malfacilaĵoj fariĝu ebenaj vojoj.

**16.1.** Sankta Patro, vastigu mian koron, por ke ĉiuj gefratoj kaj gekonatoj trovu lokon en ĝi. Liberigu min de la sklaveco de la egoismo.

**17.1.** Ho Kristo, mia Reĝo, mi obeu Vin en ĉio, kion mi faras. Donu ke ĉiu penso estu laŭ Via volo. Mia animo servu Vin seninterrompe en profunda respekto, kaj servi Vin ja signifas servi miajn kunhomojn!

**18.1.** Mia Savanto, instruu min preĝi por tiuj, kiujn mi ne amas. Forprenu la skvamojn de miaj okuloj, por ke mi vidu en ili la bonon. Montru al mi, kiel mi devas ami miajn mal-amikojn kaj la malsimpatiajn homojn.

**19.1.** Potenca Dio, mi dankas Vin, ke Vi vokis min al Via komuneco. Instruu al mi preĝi senĉese. Liberigu min el la sklaveco de teraj pensoj, kiuj ĝenas min pensadi al Vi. Donacu al mi la liberecon de ĉiela ĝojo, por ke mi ĝoje servu la helpbezonajn homojn.

**20.1.** Mia Patro, mi preĝas por tiuj, kiuj ne konas Vin, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj ne kuraĝas akcepti Vian pardonon kaj gracon.

**21.1.** Dio de la graco, mi levas mian animon al Vi; refreŝigu ĝin per la akvo de la vivo. Donacu al ĝi novan vivon. Samtempe mi petas novan vivon por la detruitaj homoj.

**22.1.** Mia Sinjoro kaj mia Dio, mi estu fidela en la plej simpla afero. Tiu estu sanktigata en Vi. Fortigu mian emon por helpi aliajn, kaj fortigu ankaŭ mian kredon.

**23. 1.** Mia Patro, certigu min, ke mi estas Via gracigita infano. Mi ĉiam pli profunde amu Vin, kaj mi sciu, ke Vi estas pardoninta ĉiujn miajn ŝuldojn.

**24.1.** Patro nia, elverŝu la akvon de la vivo riĉe super Via popolo. Refreŝigu la maltrankviligitojn. Mildigu la rigidajn korojn. La dezerto de la vivo portu denove fruktojn. La mortaj vivantoj vivu.

**25.1.** Potenca Dio, mi preĝas al Vi por ĉiuj, kiuj havas malpacon kaj kiuj sentas tiel profunde sian malpotencon. Helpu ilin kredi, ke Vi ne forlasos ilin. Montru al ili, kiom Kristo faras por ili. Ili reĝe venku pro Li, kiu tiel amas ilin.

**26.1.** Mia Patro, veku en mi la spiriton de la dankemo. Mi ne akceptu Vian gracon kvazaŭ mi meritus ĝin, sed mi laŭdu kaj gloru Vin ĉiun tagon pro Via graco kaj kompato.

**27.1.** Granda Dio, mi preĝas por mia patrujo kaj por ĉiuj regantoj en la tuta mondo. Ili honeste dividu tion, kion Vi abunde kreskigas sur la tero. Ili aŭskultu al Via voĉo.

**28.1.** Mia Patro, helpu min, ke mi komprenu la celon de "mia" vivo sur la tero. Mi ne misuzu "miajn" tagojn. Ĉu ili ne apartenas al Vi? Montru al mi la nemezureblan valoron de la tempo. Mi tiel vivu, ke ĉiu tago kaj ĉiu horo estu je honoro de Via glorata nomo.

**29.1**. Mia Savanto, mi tamen enspiru aeron de la eterneco tie ĉi sur la tero kun ĝia putreco. La fortiganta vento de la altaj montoj de Dio venadu al mia ebenaĵo kaj donacadu al mi novajn fortojn, por ke mi servu miajn geamikojn.

**30.1.** Kompatema Dio, mi bone komprenu Vian humilecon, ĉar ĝi estas la fonto de la vera forto. Mi pruvu mian forton per helpo al malfortaj geamikoj. Porti la ŝarĝon de miaj gefratoj estu honoro por mi.

**31.1.** Mia Patro, mi dankas Vin pro mia ĉiutaga pano. Donu ke mi manĝu ĝin kun respekto kaj danko. Nutru Viajn kreitaĵojn per la pano de la vivo. Ni kresku en la graco kaj en la sanktigado. Ni ĉiam promenu malantaŭ Jesuo.

**1.2.** Mia Sinjoro, nova monato komenciĝas. Helpu nin komenci kaj fini ĝin en Via spirito kaj je Via honoro. Ni plenumu Viajn ordonojn kaj trovu en ili nian ĝojon.

**2.2.** Potenca Dio, donu ke Via volo ankaŭ estu la mia. Mi ne sopiru al io ekster Vi. Ĉio, kio estas bona, alportu ĝojon, kaj mi trans-donu tiun ĝojon al aliaj.

**3.2.** Mia Patro, mi vidu miajn malbonajn agojn en Via lumo kaj ne en la ombro de homa juĝo. En Via lumo mi nur vidas lumon!

**4.2** Kara Sinjoro, donacu en miaj mizeroj kaj zorgoj la eniron al Viaj riĉaj havaĵoj. En mia nokto brilu Viaj steloj; kaj sendu Viajn anĝel-ojn al mi kiel konsolo.

**5.2.** Mia Savanto, helpu min ke mi en ĉiu situacio pensu al Via sankta ekzemplo. La vorto, kiun mi parolos, estu dolĉa, mia afableco sincera kaj mia malaprobo tamen ama. Donu al mi Vian subtenon.

**6.2.** Mia Sinjoro kaj mia Dio, Vin ni ŝatas honori kaj adori. Ni sopiru ne al io, kio ne plaĉas al Vi. Liberigu nin de ĉia egoismo kaj levu nin al Via lumo.

**7.2.** Sankta Dipatro, mi akceptu mian heredaĵon en Kristo Jesuo. Mi akiru la senfinajn riĉecojn de mia Savanto kaj disdonu ilin al aliaj. Donu al mi ŝuojn por miaj piedoj, por alporti la Evangelion de la paco al la mondo.

**8.2.** Mia Patro, se en mia koro estas malpura intenco, forprenu tion el ĝi. Se mi dezirus ion, kio doloros mian fraton, ĝi mortu en mi per Via graco.

**9.2.** Mia Dio, mi dankas Vin pro tiu ĉi tago kaj pro ĉiu graco, kiun Vi volas donaci al mi hodiaŭ. Donu ke ĝi ne estu malfruktodona tago. Mi komprenu tion, kion Vi volas instrui al mi.

**10.2.** Kompatema Sinjoro, ne estu senenhava sono ke mi estas Via disĉiplo. Donu ke aliaj rimarku tion. Faru min sincera, afabla, kompatema kaj amanta. Sanktigu min, por ke ili ekkonu, ke estas feliĉo aparteni al Vi.

**11.2.** Mia Patro, kion Vi volas hodiaŭ diri al mi? Donu ke mi tion klare aŭdu kaj komprenu. Mi havu aŭskultantan orelon kaj atentan koron. Mi ŝatas ekkoni la Veron inter multa malvero. Mi agu laŭ Via Evangelio.

**12.2.** Patro en la ĉielo, sanigu mian animon. Ĝi ne malpuriĝu pro la veneno de la mondo. Resanigu min, Sinjoro, tiam mi vere estos sana, kaj resanigu ankaŭ la korpe kaj mense malsanajn homojn.

**13.2.** Ĉiela Patro, riĉigu min per la kono de Via vero, por ke mi povu riĉigi aliajn. Ĉiun tagon mi ĉerpu novan forton el Via Vorto. Gardu min kontraŭ malicaj pensoj, kiuj malvalorigas la vivon.

**14.2.** Mia Patro, mi dankas Vin pro ĉiuj bonfaroj kaj bonfartoj de ĉi tiu vivo. Helpu min, ke mi vere vidas ilin kaj nombras ilin, por ke mia vivo fariĝu seninterrompa laŭdokanto.

**15.2.** Ho Dio, mia Patro, liberigu nin de la maltrankvileco de tiu ĉi mondo kaj plenigu niajn korojn per amo kaj respekto je Vi. Ni ne havu kontraŭajn sopirojn. Donu ke ni nur malsatu kaj sopiru al Vi.

**16.2.** Potenca Dio, Via Vorto estu mia gvidanto. Mi volas obei ĝin, ankaŭ se tio estas malfacila. Helpu min iri la rektan vojon, kiom ajn dorna ĝi estas. Via volo fariĝu.

**17.2.** Mia Patro, instruu al mi preĝi senĉese. Forigu ĉion malbonan el mi, por ke Via Spirito loĝu en mi. Tiam mi loĝas en la ombro de Viaj flugiloj.

**18.2.** Granda Dio, donacu al mi humilan spiriton. Mi tuŝu per mildaj manoj la vundojn de la mondo. Gardu min kontraŭ malpia severo kaj malama juĝo.

**19.2.** Sankta Spirito, refreŝigu mian memoron, por ke mi pensu al ĉiuj Viaj bonfaroj kaj tiam dankas Vin. Mi iru al suferanta homo kaj helpas lin. Mi daŭre levu miajn okulojn al la montoj kaj esperu je Vi.

**20.2.** Mia Patro, Via sankta spirito estu hodiaŭ ĉe mi kaj laboru en mi. Ĉiun tagon mi dediĉu min al Vi kaj al la miaj; kaj mia laboro por tiuj, kiuj suferas, estu sanktigata en Vi.

**21.2.** Potenca Dio, la radioj de Via boneco ekflamigu mian koron. Gardu min kontraŭ indiferenteco kaj malaktiveco. Mi volas resti en Vi. Baptu min per la Sankta Spirito kaj per fajra amo por miaj parencoj kaj geamikoj.

**22.2.** Graca Dio, mi levas miajn okulojn al Vi kun plena fido kaj atendo. Ni hodiaŭ promenu en apuda komuneco kun Vi. Via Vorto estu mia lumo kaj Via graco mia forto. Kaj en la forto de Via amo mi amos miajn kunhomojn.

**23.2.** Amata Patro, mi volas ĝoji en Vi. Nur Vin mi volas sekvi, sed mi deziras fari tion kun ĝojo kaj ne kiel devon. Via volo estu mia vera feliĉo.

**24.2.** Kara Patro en la ĉielo, ligu min per fortaj ligiloj al miaj gefratoj. Mi servu Viajn kreitaĵojn per vortoj, agoj kaj amaj kaj pacaj pensoj. Via granda familio vere estu harmonia.

**25.2.** Sinjoro mia Dio, mi estu certa de Via pardono. Helpu min, ke mi ne plu faru la pekojn, kiujn Vi estas pardoninta. Kaj mi pardonu al tiuj, kiuj malbone agis kontraŭ mi.

**26.2.** Ĉiela Patro, Via graco restu sur mi. Mi spertu hodiaŭ Vian forton. Liberigu min de la soleco de la egoismo. Mi amu miajn kunhomojn kaj restu kun ili en Via komuneco.

**27.2.** Ho Patro, Via kompato iras super ĉiuj laboroj de Viaj manoj. Ĝi iru ankaŭ super mi. Helpu min ekkoni la mirindan gracon, kiu subtenas mian vivon. Kaj mi komprenu, ke mi vivas tagon post tago pro Via boneco.

**28.2.** Sankta Patro, ankaŭ hodiaŭ Via lumo brilu en mia animo. La gloro de Via Evangelio ĉiam pligrandiĝu por mi kaj donu ke mi estu tutkore sindona al ĝi. Nutru min per la pano de la vivo. Kaj mi nutru aliajn per tiu vivopano. Benu la ricevontojn!

**29.2.** Mia Patro, ankaŭ mi kunlaboru por venigi Vian regnon. Gardu min, ke mi ne ĝenu Vian veron pro mia mondumo. Faru el mi veran serviston de Vi. Kaj mi servu mian kunhomon pro amo al Vi.

## Marto

**1.3.** Kompatema Sinjoro, ĉu Vi volas doni al mia laboro eternan valoron? Mi kore dankas Vin pro tio. Ĉio en mi servu Vian volon, por ke Kristo vivu en mi.

**2.3.** Patro de ĉio kio vivas, fortigu la interligon de la homaro. Kunligu iliajn korojn, por ke ĉiuj komprenu unu la alian. Ni serĉu ĝojon en la komuna Savanto.

**3.3.** Mia Sinjoro, pardonu al mi ĉion, en kio mi malsukcesis kaj benu tion, kio estis laŭ Via volo. Helpu min, ke mi restu fidela, kaj donu ke mia fino estu pli bona ol mia komenco, por ke ankaŭ ĉe mi estu lumo en la vespero.

**4.3.** Mia Patro, kiam mi estas fariĝonta maltrankvila kaj ekscitiĝema, helpu min tiam por resti en la ombro de Vi, la Plejaltulo. Trankviligu min en la tento.

**5.3.** Mia Sinjoro kaj Savanto, helpu min, ke mi hodiaŭ sekvu Vin el tuta mia koro. Mi ne timu la krucon, sed mi portu ĝin, kiam Vi ŝarĝos min per ĝi. Helpu min porti iomete la krucojn de aliaj homoj.

**6.3.** Kara Sinjoro, mi dankas Vin pro ĉio, kio agrabligas mian vivon. Kiom da ne meritaj bonaĵoj Vi ŝutas sur mian vivon kaj vojon. Mi dankas Vin precipe pro la afableco de aliaj, pro ĉiuj homoj, kiuj estas plenigitaj kun amo kaj paco.

**7.3.** Kara Patro, la ĉielo ne estas fermita, Vi ne estas malproksima, kiel ni ofte pensas. Ni neniam perdu Vian komunecon. Malfermu niajn okulojn por tio.

**8.3.** Amanta Sinjoro, gardu min kontraŭ ĉiu sklava timo. Mia vivo ne detruiĝu pro malkredo. Ĉirkaŭu min, por ke la sortobatoj kaj zorgoj ne pereigu min.

**9.3.** Ho Sinjoro mia Dio, faru el ni branĉetojn de la vera vinberujo. Ni portu multajn fruktojn kaj per tiuj ni honoru Vin. Maltrankvilaj kaj malĝojaj homoj ĉerpu konsolon kaj kuraĝon el niaj vivoj.

**10.3.** Potenca Sinjoro, mi deziras komenci mian taglaboron kun Vi. Subtenu mian malfortecon per Via forto kaj fortigu min, por ke mi plenumu Vian volon kun ĝojo.

**11.3.** Mia Patro, direktu hodiaŭ mian vivon. Regu min en ĉio. Ankaŭ miaj pensoj estu laŭ Via volo, kaj mi komprenu Vian Vorton kaj agu laŭ ĝi por la bonfarto de miaj kunhomoj.

**12.3.** Ho Sinjoro mia Dio, donacu la certecon, ke ni estas repacigitaj kun Vi per nia Savanto. Ni restu kiel infanoj en la domo de Vi, nia Patro. Konduku nin en Vian sanktan komunecon, kaj disdonu al ĉiuj homoj la riĉecon de Via amo.

**13.3.** Patro, mia laboro estu kiel servado al Vi. Sanktigu kaj purigu mian tagan laboron, por ke mia animo en Via beno kresku kaj mi estu beno por aliaj.

**14.3.** Mia Savanto, faru min dolĉanima kaj mian koron humila. Donacu al mi trankvilan spiriton kaj Vian pacon, por ke mi laboru por la paco en la mondo.

**15.3.** Spirito de la amo, prilumu ĉiujn, kiuj havas iom da influo en nia patrujo. Donu Vian lumon al tiuj, kiuj parolas per vorto aŭ verko al aliaj, por ke eliru de ili puriganta forto kaj sanktiganta energio.

**16.3.** Kompatema Dio, montru al mi, kiel mi povas malgrandigi la ĉagrenon de la mondo. Helpu min, kiam mi hodiaŭ klopodas malpezigi la ŝarĝon de mia kunhomo. Plenigu min kun Via kompato.

**17.3.** Mia Patro, mi tre deziras ĉion transdoni al Vi. Purigu miajn pensojn, mildigu miajn sentojn kaj sanktigu mian volon. Tial mi devas esti liberigita de interna malharmonio kaj ŝanceliĝo.

**18.3.** Ĉiela Patro, atentigu mian koron je Via volo, por ke mi gloru Vian nomon. Ĉio en mi, kio kontraŭstaras Vin, tamen Vin obeu tiel, ke malkaraj vortoj ne malbeligu la plenan harmonion, sed ĉio en mi laŭdu Vian sanktan nomon.

**19.3.** Eterna Dio, mia vintro fariĝu printempo! Degelu ĉion, kio estas en mi malvarma, per la ardo de Via graco. Mi vivu por Vi kaj estu fruktodona.

**20.3.** Sankta Spirito, donu ke mi ĉiam pli submetiĝu je plena ofero. Via graco senlime laboru en mi. Via Regno venu al mi, kaj per mi al aliaj.

**21.3.** Mia Savanto, faru min infano de la lumo. Gardu min kontraŭ plendoj kaj ploroj. Mi neniam fariĝu infano de la nokto kaj de la tristeco. Plenigu min kun amo kaj ĝojo; kaj mi petas, ke ankaŭ aliaj ĉerpu el mia ĝoja cert-eco novan kuraĝon.

**22.3.** Ho, Reĝo de la paco, finigu Vi la batal-on inter la homoj. Forprenu ĉiun malharmoni-on inter ni. Liberigu nin de ĉia amareco kaj forigu el ni suspekton kaj malfidon.

**23.3.** Mia Patro, montru al mi Vian klarecon, se miaj okuloj povas elteni tion. Malkovru al mia animo ion de Via gloro, kaj konduku min al ĉiam pli da adoro kaj al ĉiam pli da sindono.

**24.3.** Eterna Dio, se Vi volas, Vi povas min purigi. Helpu min kredi, ke Vi eĉ al lepruloj povas kaj volas doni Vian purecon. Helpu min per la forto de Jesuo iom forigi la makuladon de la mondo. Kreu al mi puran koron.

**25.3.** Dio de la amo, instruu al mi disdoni Vian amon al aliaj. Donu ke mi ne elektu la facilan vojon de la propra plezuro, sed la vojon de la ĝoja devo, eĉ se tiu portos al mi ĉagrenon kaj sortobaton. Mi kredu, ke Vi kondukas min.

**26.3.** Eterna Dio, donu ke ĉio, kion mi komencas, estu sanktigata en Vi. Renovigu mian spiriton, por ke mi laboru sur la tero kun ĉiela sinteno. Benu miajn geamikojn, kie ajn ili troviĝas.

**27.3.** Mia Patro, aŭdu mian preĝon por ĉiuj gefratoj en la tuta mondo. Via lumo spegulu sin en iliaj vizaĝoj.

**28.3.** Kompatema, krucumita Savanto, kiam la tento proksimiĝas, helpu min tiam pensi al Viaj doloroj, por ke ili gardu min. Mi malamu la malbonajn agojn, kiuj ĉagrenas Vin. Mi venu el ĉiu tento kiel venkanto!

**29.3.** Mia Patro, lumigu la malgrandajn devojn de ĉi tiu tago, ĉar tiam ili brilos en ĉiela beleco. Mi kredu, ke la Dia beno ripozas sur la plej simpla kaj eta tasko.

**30.3.** Eterna Dio, Vi portas min kun tiom da pacienco, helpu min esti pacienca por aliaj. Montru al mi la benon de la humila pacienco. Donu ke mi ne ĝenu Vian intencon per miaj propraj pensoj. Mi atentu kaj atendu Vin.

**31.3.** Kompatema Savanto, kolektu la rompitajn pecojn de mia vivo. Kreu ion el ili, kio estas bona laŭ Vi. Pardonu mian malfidelecon. Via graco subtenu min.

**1.4.** Ĉiela Patro, malfermu miajn okulojn por la mirindaĵoj de Via boneco. Ili ja fariĝis jam tute kutimaj por mi. Mi tutkore laŭdu Vin pro ili, kaj mi ĉiutage denove miru pri ili.

**2.4.** Mi dankas Vin, ho Patro, pro ĉi tiu tago. Ĝi estas de Vi, mi uzu ĝin en Via servo. Benu miajn gefratojn, helpu ilin en iliaj mizeroj kaj ĝojoj.

**3.4.** Releviĝinta Sinjoro kaj Savanto, mi pensu hodiaŭ al Via morto sur la kruco. Via sufero kaj morto plenigu min kun respekto kaj sankta seriozeco.

**4.4.** Graca Dio, estu kun ĉiuj gepatroj de la mondo. Helpu ilin konduki kaj eduki siajn infanojn laŭ Via volo. Donu al ili fantazion kaj komprenemon por la juna generacio. Ili subtenu la bonajn agadojn de la gejunuloj.

**5.4.** Kompatema Patro, mi petas pro la spirito de la humileco. Gardu min kontraŭ netoleremo, malmoleco kaj fierego. Helpu min uzi mian forton por porti la krucon de mia proksimulo.

**6.4.** Mia Savanto, mi pensu al Via morto, kaj mi spertu la forton de Via releviĝo. Levu min el mia ŝajna morto al nova vivo. Fariĝu hodiaŭ belega Paskotago.

**7.4.** Ho Patro, la homoj en la bonfartaj landoj komprenu, ke ili devas doni el sia materia riĉeco kaj abunda superfluo al la malhavantoj kaj rifuĝantoj en la mondo, ne kiel almozo, sed kiel rajto de la aliaj. Mi mem donu la ekzemplon.

**8.4.** Via afero estu mia afero, mi ĝin servu per tuta mia koro, ho Dio. Mi estu fidinda kaj sincera. Gardu min kontraŭ ĉiu malvereco.

**9.4.** Potenca Dio, Via Releviĝo ankaŭ relevu min el miaj tagaj zorgoj kaj maltrankviliĝoj. Vi malfermis la pordon al Via Regno por mi. Ĝi restu malfermata por ĉiu, kiu kredas en Vi.

**10.4.** Sinjoro Jesuo, benu la infanojn kaj la gejunulojn de la tuta mondo. Ili vivu en libereco kaj paco. Donu, ke ili povu ludi en ĝojo, ĉirkaŭataj de amo.

**11.4.** Eterna Dio, Vi, Dio de la Espero, faligu ion de Via lumo sur min kaj liberigu min de la timo kaj dubo. Liberigu ankaŭ tiujn, kiuj dronas en drogoj kaj donu al ili novan vivon sen timo.

**12.4.** Kara Patro en la ĉielo, benu la geedzojn, kie ajn ili loĝu. Ili estu fidelaj, amantaj, helpantaj unu la alian. Donu komprenemon kaj saĝecon al ili. Ilia komuna vivo estu je Via honoro kaj plena de danko.

**13.4.** Mi dankas Vin, ho Dio, pro la homoj, kiujn Vi donis al mi. Ili estas al mi tiel karaj. Estu ankaŭ kun tiuj homoj, kiuj havas neniun sur ĉi tiu mondo. Mi estu tiel kara por ili, kiel la miaj por mi.

**14.4.** Mia Savanto, la paco estas multekosta afero. Mi donu ĉion, kion mi posedas, por tiu afero. La mondo bezonas ĝin. Benu la pacalportantojn.

**15.4.** Ĉiela Patro, mi daŭre sentu min infano de Vi. Mi kondutu tiel, ke tiu konduto plaĉu al Vi kaj al miaj proksimuloj.

**16.4.** Eterna Dio, aŭdigu hodiaŭ al mi Vian voĉon. Donu ke la kriado de la mondo ne silentigu tiun ĉielan voĉon, kaj ke mi tamen kuru por helpi la kriantojn. Mi ne nur aŭdu ĝin en la silenta hejma ĉambro, sed ankaŭ meze inter la bruado de la trafiko kaj la svarmado de la homoj.

**17.4.** Mia releviĝinta Sinjoro, mi spertu la forton de Via releviĝo. Donu la vortojn en mian koron, kiuj estas saĝaj kaj kiuj helpas al aliaj.

**18.4.** Mia Patro, mi hodiaŭ volonte obeu Vin. Mia devo estu mia feliĉo kaj Via ordono mia ĝojo. Mi aŭskultu al Via voĉo.

**19.4.** Sankta Patro, mi fariĝu infano de la Espero. Mi ne estu malĝoja pro timo kaj mal-kredo. Mi fidante atendu la matenon, kiam mi vagas en malluma valo.

**20.4.** Kompatema Dio, ekflamigu en mi la fajron de sankta amo. Mi klopodu ami malsimpatiajn homojn. Mi estu fidela en la amo je Vi kaj je miaj kunhomoj. Pozitivajn kritikojn mi plenkore akceptu.

**21.4.** Sankta Patro, mi trovu ripozon ĉe Vi. Mi tiel volonte perdas la rapidegemon kaj eniras Vian plenan pacon. Forprenu bonvole ĉian ĝenon kaj malindan zorgemecon.

**22.4.** Sankta Dio, helpu min ne forgesi, ke mia korpo estas Via templo. Mi vivu modere, ĉaste, prudente kaj saĝe. Mi komprenu, ke la leĝoj de la saneco estas Viaj ordonoj por nia bonfarto.

**23.4.** Ho Dio, helpu kaj subtenu la homojn, kiuj hodiaŭ renkontos la tenton. Savu ilin kaj konduku ilin sur Vian vojon. Se ni povas helpi, ekipu nin per bonaj rimedoj. Konsolu ilin per Via graco.

**24.4.** Ĉiela Patro, klinu Vin al Via popolo. Ili vidu Vian gloron kaj ekkonu la veron meze de mensogoj. Kompatu ĉiun, kiu ne volas koni Vin. Veku en ili la sopiron al sankteco, kaj konduku iliajn piedojn sur la vojo de la paco.

**25.4.** Mia Patro, donu al mi la saĝecon, diskonigi al aliaj, ke vi estas tre proksima al ni. Vi ne estas ia mistera, fora potenco, sed amanta Patro de ĉiu homo.

**26.4.** Sankta Patro, mi malamu la pekadon. Mi nur pensu al tio, kio estas bona kaj pura. Montru ĉiam pli de Via mirinda gloro, kaj faru min simila al Via bildo.

**27.4.** Sankta Spirito, ni ĉiam pli ekkonu Vin en niaj vivoj kaj kalkulu kun Via ĉeesto. Konduku nin kaj prenu niajn korojn kaj volojn en Vian posedon. Kiu pensas al Vi, ne povas elekti ŝirmon de teruraj armiloj.

**28.4.** Mia Patro en la ĉielo, mi vidu de malproksime Vian tronon de la lumo. Mia vivo estu plena de respekto. Mi ankaŭ respektu miajn proksimulojn kaj trovu ilin pli taŭgaj ol mi mem.

**29.4.** Sinjoro, mia Dio, la laboro de ĉi tiu tago komenciĝas denove. Donu ke mi nur havu purajn intencojn ĉe ĉio, kion mi estas faronta, kaj sanktigu miajn dezirojn per la sento de Via ĉeesto.

**30.4.** Kompatema Patro, ĉi tiu monato ne finiĝu, sen ke mi estu repacigita kun Vi. Pardonu al mi ĉiun malobeemon kaj malverecon. Mi komencu kun pura koro la novan monaton.

## Majo

**1.5.** Ho Patro, kiu donacis al la homoj la laboron, benu en ĉi tiu tago de la laboro ĉies laboron. Ĉiu faru sian laboron en ĝojo kaj komprenu, ke labori estas beno por la homaro. Tamen ankaŭ la senlaboruloj trovu denove kontentigan okupon, mi petas.

**2.5.** Ĉiela Patro, mi tutkore dankas Vin pro ĉiuj Viaj bonaĵoj. Vi kronu ankaŭ ĉi tiun tagon per Via bono. Ni ĉiam rimarku tion.

**3.5.** Sankta Dio, la beleco de la printempo instigu min por tutkore laŭdi Vin, la Kreinton. Forprenu de mi la potencon de la vintro. Via spirito forpelu la froston de mia koro, kaj la ĝojo de la Sinjoro ekloĝu en mi.

**4.5.** Mia Patro en la ĉielo, montru al mi la valoron de la etaj aferoj. Mi sanktigu Vin per ili. Faru min fidela.

**5.5.** Kompatema Dio, benu la klopodojn de tiuj, kiuj sincere provas trovi unu la alian. Benu la kontaktojn inter la eklezioj kaj inter la diversaj religioj. Ni donu el nia riĉeco al aliaj kaj inverse.

**6.5.** Ho Dio, mia Patro, mi estas tiel laca. Fortigu min per Via graco. Ne forlasu min, sed benu miajn vortojn kaj agojn, por ke ili estu beno por tiuj, kiujn mi renkontos sur la vivovojo.

**7.5.** Ĉiela Patro, donacu al mi la gracon, ke pro mia vivo pligrandiĝu la frata amo inter la homoj. La abismo inter la homoj pli kaj pli malaperu. Helpu min planti amikecon kaj fidon.

**8.5.** Mia kara Sinjoro, subtenu min, por ke mi ĉion, kio estas malfacila kaj malagrabla, trankvile travivu. Ankaŭ miaj seniluziigoj fariĝu beno por mi.

**9.5.** Mia Patro, helpu min hodiaŭ doni al aliaj bonan kaj afablan influon. Mi helpu per trankvila kredo la timantojn kaj la senkuraĝulojn. Mia interna ĝojo ĝojigu kaj feliĉigu aliajn.

**10.5.** Mia Patro, donu ke la malĝojantoj sentu, ke Vi ne forlasis ilin, sed ke Vi ĉiam ĉeestas kaj ame ĉirkaŭas nin. Ĉu Vi volas forporti ilian malĝojon? Dankon.

**11.5.** Eterna Dio, Via beno estas mia feliĉo kaj Via paco mia ripozo. Grace rigardu Viajn kreitaĵojn. Ili ofte pensas tiel strange pri Vi kaj donas al Vi la kulpon pro agoj, kiujn la homoj mem faras.

**12.5.** Hodiaŭ estas grava tago por mi. Trankviligu min kaj forprenu mian nervozecon. Subtenu min en la decido kaj donu klarecon al mia laca cerbo.

**13.5.** Mia Patro, la lumo de Via Evangelio penetru mian animon, por ke la ĉiela semo ĝermu en mi kaj la burĝonoj de ĉio, kio estas bona kaj pura, ekfloru en plena beleco.

**14.5.** Patro de la lumo, mi dankas Vin pro ĉiu homo, kiu avertas kaj admonas min, pro ĉiu, kiu per vorto aŭ verko pligrandigas mian konon pri Vi. Vi estu laŭdata pro ĉiu riĉigo.

**15.5.** Patro de ĉiu graco, mi dankas Vin pro la ĉiutaga pano. Mi akceptu ĝin el Via mano kaj ne kvazaŭ mi havus rajton je ĝi.

**16.5.** Mia Patro, mi portas miajn ŝuldojn antaŭ Via vizaĝo. Detruu ĝian potencon super mi kaj ekstermu ĉion, kio ne estas laŭ Via volo. Mi eklernu Vian volon per la Sankta Biblio, per la vortoj kaj agoj de Jesuo Kristo.

**17.5.** Kara Dio, mi preĝas hodiaŭ por ĉiuj junaj kristanoj. Fortigu ilin en malfacilaj cirkonstancoj. Ili ne timiĝu pro la potenco de la Deloganto. Iliaj internaj vivoj maturiĝu en la lumo de Via graco kaj amo.

**18.5.** Sankta Spirito, loĝu en mi. Konduku min en la veron. La ordonoj de Vi estu ĝojo por mi. Mi estu fidela disĉiplo de Jesuo Kristo.

**19.5.** Ho Sinjoro, estu kun la orfoj de la tuta mondo, la orfoj pro la militoj, pro la akcidentoj kaj pro la malsanecoj. Pardonu al ni niajn ŝuldojn.

**20.5.** Kompatema Dio, movu la korojn kaj pensojn kaj decidojn de la regantoj de ĉi tiu mondo, tiel, ke ili decidu por la bono de la tuta homaro.

**21.5.** Graca Spirito, kompatu la patrinojn de ĉi tiu mondo, tiujn, kiuj ne havas nutraĵon por siaj infanoj, kiuj ne havas energion por eduki ilin kaj kiuj ne povas doni al siaj infanoj patron. Estu Vi ilia Patro. Helpu la virinojn, kiuj ne povas kaj kuraĝas havi infanon kaj tiam abortigas la komencitan frukton.

**22.5.** Savanto de la mondo, mi preĝas por ĉiuj, kiuj atestas pri Vi, por tiuj, kiuj predikas Vian Evangelion. Ili plenumu sian vokiĝon kun ĝojo. La mondo akceptu ilian ateston.

**23.5.** Mia Patro, montru al mi, kiel mi povas servi Vin. Mi ne meditu egoiste, sed unue trovu la vojon al la alia, kiu bezonas helpon. Nur se mi plenumas Vian volon rilate ilin, mi vere trovos Vin.

**24.5.** Mi dankas Vin pro Via boneco, Sinjoro. Ĝi efikas je mia koro kiel milda printempa pluveto, kiu estas tiel fruktodona. Ankaŭ mia vivo estu simila.

**25.5.** En Via mano mi estas sekura kiel la juna birdo en sia nesto. Mi same kiel ĝi flugu, portata de Vi. Tiam mi estos libera kiel birdo, kie ajn mi iru.

**26.5.** Sankta Patro, mi dediĉas al Vi la laboron de ĉi tiu tago. Forprenu ĉiun memamon el ĝi, por ke mi ne estu obstaklo en mia taga profesio por mia kunlaboranto.

**27.5.** Mia Patro, mi hodiaŭ atendu grandajn aferojn. La vivo ne pelu min sencele, sed mi atendu Vin, mian Sinjoron, kiun mi volas tutkore ami.

**28.5.** Patro, benu la seninfanajn geedzojn. Ili trovu feliĉojn unu en la alia kaj kune en la laboro por aliaj infanoj, kiuj bezonas helpon kaj amon.

**29.5.** Mia Patro, mi vivu kiel Via infano, tio estas kiel infano de la lumo. Forigu el mi ĉiujn mallumajn angulojn de mia koro. Mi ne havu sekretojn antaŭ Vi.

**30.5.** Nia Dio, Via Regno venu! Ni laboru en Via servo por pli rapide venigi Vian Regnon. La novaj tero kaj ĉielo venu, kiel Vi estas promesinta al ni. Sed ni kredas, ke Vi ne volas venigi Vian regnon sen ni, kiel helpantoj de Vi en ĉi tiu mondo.

**31.5.** Sankta Spirito, vi havas donacojn por la junaj homoj en la mondo. Benu ilin. Donu al ili pacon, ĝojon, amon kaj esperon. Ili ne perdu la fidon en pli bonan mondon, al kiu ili mem volas kontribui per justaj agoj.

## Junio

**1.6.** Granda Dio, ĉi tiu monato estu por mi tempo de riĉa interna kresko. Mi laboru en Via forto por bonaj, noblaj kaj pacaj aferoj.

**2.6.** Sankta Spirito, mi sentu Vian ĉeeston. Vi ekzistu por mi ne en belaj vortoj, sed en sankta kuneco. Mi ĝoje helpu aliajn per Via forto.

**3.6.** Patro en la ĉielo, mi ne forgesu preĝi por aliaj, kiuj petis mian propreĝon. Helpu ilin kiam ili suferas, en doloroj, en korpaj kaj mensaj malfortoj, en malĝojoj, timoj kaj mal-kuraĝoj. Vi konas iliajn bezonojn.

**4.6.** Sankta Spirito, sanktigu mian tutan vivon. Mia ĉiutaga laboro estu preĝo kaj purigu min per tiu preĝado. Mi soifu kaj malsatu al Via justeco, tiel ke mi deziras ĝin ankaŭ por aliaj.

**5.6.** Sinjoro Jesuo, instruu al mi ĝuste preĝi. Mia preĝado ne estu dezirlisto; mi forgesu miajn proprajn pensojn kaj nur koncentriĝu je Vi. Mi ankaŭ ne forgesu la homojn por kiuj neniu preĝas.

**6.6.** Feliĉigu, ho amanta Patro, la solecajn homojn, tiujn, kiuj suferas, ĉar ili ne povas trovi vivkunulon. Komprenigu al ili, ke ili tamen ne vane vivas, sed povas dediĉi sian vivon al Via servo kaj al tiu de aliaj, tiel ke ili mem feliĉiĝos.

**7.6.** Amanta Patro, estu kun la maljunaj homoj. En la vespero de siaj vivoj ili ekkonu Vin kaj trovu en Vi la veran feliĉon.

**8.6.** Ĉiela Patro, mi dankas Vin ke Via amo neniam ĉesas. Helpu min kredi, ke ĝi min portas kaj subtenas. Ĝi donu al mi la fortojn por mia tasko. Plenigu min kun malegoista sindono al Via sankta volo.

**9.6.** Sankta Spirito, mi dankas Vin pro la brilo de ĉi tiu mateno. Ĝi estu en sia pura klareco bildo de mia animo. La lumo de la eterneco penetru en mian koron, tiam mi povos esti ĝoja kaj anonci la bonon de Dio.

**10.6.** Patro nia, ni hodiaŭ plenumu Vian volon. Ni estu amindaj en niaj vortoj, por ke ankaŭ aliaj per ili trovu Vin.

**11.6.** Sankta Dipatro, mi neniam forgesu, ke mi estas Via infano. Ho, ĉiuj Viaj infanoj ekkonu Vin kiel ilian Patron, kiu tiel amas ilin. Sed Vi havas ankaŭ aliajn infanojn, kiuj ne estas de "nia" stalo. Ni ankaŭ amu ilin plenkore.

**12.6.** Forta kaj potenca Dio, la sento de Via forto estu pli forta en mi ol la sento pri mia malforto. Lertigu min per Via glora graco. Mi venku en Kristo.

**13.6.** Estu kun la juna generacio, ho kara Patro, helpu ilin en la klopodoj plibonigi la vivon de tiuj, kiuj suferas kaj malsatas. Iliaj klopodoj ne estu vanaj kaj la pli aĝuloj komprenu kaj subtenu ilin per agoj kaj preĝoj.

**14.6.** Graca Dio, estu kun la homoj, kiuj hodiaŭ devas morti, ĉu pro akcidento kaŭze de malatento de alia uzanto de la vojo, ĉu pro propra malatento, ĉu pro longa nekuracebla malsano, ĉu atendite, ĉu subite. Kompatu ilin kaj konduku ilin en Vian Regnon, por ke ili vivu en eterna gloro.

**15.6.** Ho Patro, mi ĉiam staru tie, kie oni bezonas min. Mi atentu miajn proksimulojn, ĉu parencajn, ĉu tutfremdajn. Mi ofere helpu, ne pensante al mi mem.

**16.6.** Kompatema Dio, helpu nin labori por la paco en la mondo, en la lando, en la urbo, en la eklezio, en la familio kaj en niaj propraj koroj.

**17.6.** Ho kara Sinjoro, montru al mi miajn kaŝitajn mankojn. Liberigu min de miaj malbonaj pensoj, sopiroj kaj agoj. Mi estu sincera je mi mem, je Vi kaj je miaj geamikoj.

**18.6.** Mia Savanto, helpu la gejunulojn, por ke ili sukcesu en la agado por plibonigi la socian vivon kaj la situaciojn, en kiuj multaj devas vivi. Pardonu se mi ne plenumis Vian volon tiurilate.

**19.6.** Ho Dio, mi amu ĉiam pli tion, kio estas bona kaj nobla. Forprenu de mi la skvamojn de miaj okuloj, por ke mi vidu la aferojn tiel, kiel Vi vidas ilin.

**20.6.** Plejpotenca Dio, fortigu min per Via pano. Mi laboru per ĉiuj miaj fortoj, ricevitaj de Vi por la paco en la mondo. La justeco regu, kaj la bonhavo de la tuta mondo estu honeste dividota. Helpu min kiel ajn influi la regantojn.

**21.6.** Hodiaŭ, ho Kreinto, la naturo estas en sia plej bela pleneco. Ankaŭ mi kresku al tiu pleneco spirita. Ho, donu ke ni respektu la naturon kaj ne detruu ĝin.

**22.6.** Kara Sinjoro, mi preĝas hodiaŭ por tiuj, por kiuj neniu preĝas. Vi konas ilin, kompatu ilin. Ili ekkonu Vin kaj trovu en Vi la feliĉon.

**23.6.** Sankta Patro, benu min por ke mi estu beno por aliaj. Torentoj de vivanta akvo eliru el mi. Mi portu al la homoj en malfacilaj cirkonstancoj veran ĝojon. Mi estu kiel fonto, kiu refreŝigas la soifantan vojaĝanton.

**24.6.** Granda Dio, instruu al mi, kiel mi devas promeni antaŭ Vi en sankta timo. Mi vidu Vin en la spirito kaj genuu antaŭ Vi. Plenigu min per kaj kun Via spirito.

**25.6.** Mia Patro, ne la mondo stampu sian markon sur min, sed per Via graco mi laboradu por la renovigo de la mondaj reguloj kaj strukturoj laŭ Via intenco.

**26.6.** Amanta Patro, ni dankas Vin, ke Vi tiel belege kreis la teron. Ni laŭdas Vin pro ĉio, kio anoncas Vian Majeston. Malfermu niajn okulojn, por ke ni vidu Vian gloron kaj helpu nin kontraŭstari ĉiujn metodojn, kiuj detruos ĝin.

**27.6.** Mia Sinjoro, ĉi tiu tago havu bonan komencon kaj kontentigan finon. Riparu la rompitajn fadenojn de la bonaj intencoj.

**28.6.** Mia Patro, Via Spirito konduku min ĉiun horon de la tago. Ĝi lumigu miajn pensojn, ekflamigu mian koron kaj instruu al mi tion, kion mi devas pensi kaj paroli. Helpu min ke mi ne ĉagrenu Vian Spiriton per vortoj kaj agoj.

**29.6.** Jesuo Kristo, estu kun la junaj homoj, kiuj ekamos unu la alian. Gardu ilin kontraŭ tento korpa, por ke ili trovu la veran amon. Via beno kunligu ilin, kaj ili estu unu.

**30.6.** Dio de la amo, la mondo fariĝas pli kaj pli ĥaosa kaj estas ofte tre malluma. Estu kun ni en la mallumaj horoj de nia vivo. Tiuj horoj ne estu niaj malamikoj, sed niaj amikoj, ĉar Vi apudestas. Formu nin per tiu doloro kaj perdo kaj tempa ĉagreno por Via eterna prospero.

**1.7.** Kara Dio, mi levas mian koron al Vi. Mi vivu en tiu alteco, kaj miaj pensoj ne vagadu al malvaloraj aferoj, sed ili koncentriĝu je Vi. Tiam mi plej bone povas zorgi por miaj kunhomoj.

**2.7.** Eterna Patro, fonto de lumo kaj paco, ŝanĝu nian prizorgemon en fidon, nian timon en pacon, nian maltrankvilon en ĝojon, mi petas.

**3.7.** Ho Patro, estu kun ĉiuj, kiuj suferas, kiuj malsatas kaj kiuj vivas en granda mizero. Helpu min doni ion de mi mem, kaj por konsoli kaj por nutri ilin.

**4.7.** Kompatema Sinjoro, malfermu mian koron por Via Vero. Mi volas ami Vin kaj serĉas Vian lumon. Helpu min, transdoni tiun lumon al aliaj, por ke ankaŭ iliaj vivoj fariĝu lumaj.

**5.7.** Graca Dio, benu kaj subtenu tiujn, kiuj devas fari ekzamenon. Ili klare memoru tion, kion ili estas lernintaj. Ili bone esprimu siajn pensojn. Kaj ili ne forgesu danki Vin poste.

**6.7.** Ho Patro, helpu tiujn, kiuj ne havas ŝat-okupojn. Ili ne misuzu sian liberan tempon. Mi petas ke ili trovu feliĉon en simplaj aferoj.

**7.7.** Ĉiela Patro, glorata estu Vi. Vi kresk-igas la herbon sur la montoj kaj plenigas la valojn per belegaj floroj. Via tero estas plena de Via boneco.

**8.7.** Potenca Dio, Fonto de ĉiu beno, altiru mian koron al Vi. Mi estu unu kun Vi en la profundo de mia animo. Regu miajn pensojn kaj renovigu miajn sopirojn, por ke ili estu laŭ Via volo.

**9.7.** Patro de ĉiu kompatemo, Via spirito regu. La regantoj en la mondo aŭskultu al Via voĉo. Ni helpu ilin aŭskulti. Ĉiu, al kiu Vi donas potencon, klopodu fari tion, kio plaĉas al Vi.

**10.7.** Ho Patro, ni laŭdu Vin per kantoj kaj himnoj. En niaj animoj estu ĝojo kaj danko. Danko pro la bela somera vetero, pro la fruktoj kaj la floroj, pro la bestoj kaj entute pro la bela naturo.

**11.7.** Sankta Spirito, memorigu al mi tion, kion mi rapide forgesas. Mi nur memoru la bonajn aferojn kaj forgesu la malagrablaĵojn. Fakte mi ne hodiaŭ bezonus lerni, kion Vi hieraŭ jam al mi instruis.

**12.7.** Mia Patro, donacu al mi la forton por kredi en Via amo kaj en la espero. Pro miaj eraroj tamen mi neniam malesperu kaj pro Viaj promesoj mi neniam timu.

**13.7.** Ho Patro, estu kun la homoj, kiuj preparas sin por la ferioj. Konduku ilin dum la vojaĝoj, gardu ilin kontraŭ akcidentoj kaj benu kaj refreŝigu ilin korpe kaj spirite.

**14.7.** Mia Dio, benu la preparantojn de kongresoj, de internaciaj renkontiĝoj kaj ekumenaj kunvenoj. La prelegontoj parolu vortojn, kiuj estas instigataj de Vi. La aŭskultontoj ekkonu Vin.

**15.7.** Mia Patro, la fino de mia vivovojo estu pli glora ol la komenco. Estu lumo en la vespero de la vivo. Via pardonanta amo forpelu ĉiujn nubojn ĉe mi.

**16.7.** Ho Dio, mia ĉiela Patro, mi konfidas min al Vi. Mi faru ĉiujn aferojn en Via lumo. Liberigu min de la faroj de la mallumo, de la kaŝitaj aferoj. Mi servu miajn gefratojn kaj geamikojn ame kaj humile.

**17.7.** Mia Patro, instruu al mi esti dankema. Montru al mi la riĉecon de Via graco, por ke mi senĉese povu laŭdi kaj glori Vin. Savu min de la malkontenteco.

**18.7.** Dio, eterna Lumo, lumigu ankaŭ grace mian spiriton. Restu ĉe mi, kiam fariĝas mallume kaj kiam miaj fortoj malgrandiĝas. Mi vivu kaj agu kiel infano de la lumo.

**19.7.** Mia Patro, mi ne forgesu, ke mi apartenas al unu granda familio. Ĝiaj membroj fariĝu pli feliĉaj pro mia vivo. Neniu malhavu pro mia malfideleco konsolon kaj ĝojon; neniu iru tra la vivo malriĉe, ĉar mi ne plenumis mian devon. Helpu min helpi aliajn.

**20.7.** Eterna Dio, benu la kunvenojn de la homoj, kiuj deziras esti disĉiploj de Vi. Benu iliajn vortojn kaj agojn. Benu ilin spirite kaj korpe. Subtenu ilin grace kaj ame. Kaj ili vere amu unu la alian.

**21.7.** Mia Patro, mi kredu al la forto de la nevidebla mondo. Kiam ĉi tiu vivo ŝajnas al mi tiel timige vera kaj reala kaj la alia vivo tiel malcerta, montru tiam al mi Vian ne kontraŭstareblan forton kaj potencon kaj amon. Mi ripozu en Vi kaj daŭre fidu je Vi.

**22.7.** Patro nia, mi tute dediĉu min al la alia. Donu al mi saĝecon kaj amon por trovi la ĝustajn vortojn, kiuj gajnas la simpation kaj komprenon de la alia. Sen amo ja neniu povas vivi.

**23.7.** Dio de la forto, rigardu grace al la malforteco de ni, Viaj infanoj. Ni ne estu venkataj per la malbono, ekipu nin per kaj kun Via granda forto. Faru nin nevenkeblaj per Via graco.

**24.7.** Kara Sinjoro, ni dankas Vin pro Via Vorto, pro Via ĉeesto, pro Via pano kaj vino, pro la himnoj kaj psalmoj, pro la muziko, kiu levas nin el la ĉiutaga vivo al pli alta sfero.

**25.7.** Ho nia Patro, ni ĉiuj aŭdu hodiaŭ Vian voĉon inter la multaj homoj, meze en la bruo de la trafiko, dum la vojaĝo, dum prelegoj, en ĝojo kaj doloro, en la naturo.

**26.7.** Kompatema Patro, helpu min kredi, ke mi, malfortulo, povas fari grandajn aferojn pro Kristo.
Mi ne pereu en teraj bagatelaĵoj, sed Vi faru el mi infanon, kiu daŭre atendas Vin. Mi ĉiam pli proksimiĝu al la granda celo de mia vivo.

**27.7.** Mia Patro, mia danko ĉiun matenon estu nova. Mi ĉiam pli rimarku Vian gracon, por ke mia laŭdokanto neniam ĉesu.
Ho, faru min kantanta infano de Vi.

**28.7.** Ho Patro, se mi hodiaŭ devas adiaŭi bonan amikon, donu ke revido iam sekvu.
Benu ĉiujn, kien ajn Vi kondukos ilin. Benu tiujn, kiuj postrestas. Ni restu apude en spirito.

**29.7.** Ho Sinjoro, kompatu la ĉu korpe, ĉu spirite subprematojn kaj malliberulojn. Ili tenu libera la vojon al Vi kaj vigle promenu sur ĝi. Ne forlasu ilin.

**30.7.** Kompatema Dio, mi preĝas por ĉiuj, kies vivo estas plena de seniluziigoj, kiuj ne-niam spertas la dolĉecon de la tera bonfarto. Grace subtenu ilin kaj gardu ilin kontraŭ amareco. La kuneco kun Vi estu por ili ne-mezurebla kaj riĉa kompenso.

**31.7.** Ho Patro en la ĉielo, mi kore dankas Vin pro la granda beno, kiun donas la inter-nacia lingvo Esperanto al la homaro. Tamen multaj homoj ne volas lerni ĝin pro nekompre-nebla antaŭjuĝo. Helpu nin disvastigi ĝin, por ke ĉiam pli da homoj eklernu ĝin kaj spertu ĝian grandan valoron rilate la interkompren-iĝon de ĉiuj homoj, kie ajn ili loĝas.

**1.8.** Multaj homoj, ho Sinjoro, estas hodiaŭ en moviĝo. Benu tiujn, kiuj ĉeestas grandajn manifestadojn, ĉu korpe, ĉu spirite. Donu ke ili celu la plibonigon de la homaj rajtoj kaj rilatoj kaj iliaj vivcirkonstancoj.

**2.8.** Kompatema Dio, plenigu min kun Via humileco, ĝojo kaj amo. Malmoleco kaj amareco restu malproksime de mi. Mia koro produktu fruktojn de Via spirito je honoro de Via nomo.

**3.8.** Patro en la ĉielo, eble hodiaŭ multaj samideanoj estas kune. Ili komprenu unu la alian. Ili ĝoju en la kunestado. Ili hejmenportu tiun ĝojon kaj semu ĝin en aliajn korojn, por ke la rikolto estu abunda.

**4.8.** Mia Patro, mi ĝuu pro la beleco de la somero. Tiu beleco sopirigu min al la beleco de sankta vivo. Laŭdata estu Via Nomo.

**5.8.** Mia Sinjoro, mi dankas Vin pro la multaj benoj, kiujn mi ricevadas de Vi. Mi dankas Vin pro la lingvo Esperanto, per kiu mi spertadas tiom da bono, per kiu mi ricevas tiom da geamikoj, kaj per kiu mi havas pli intiman kontakton kun Vi.

**6.8.** Ĉiela Patro, mi hodiaŭ faru ion por Vi, kiom ajn malgrandan. Mia laboro estu beno por aliaj. Ĉio, kion mi diras kaj faras, estu plenigata de sankta forto. Mi similu je la bildo de mia Sinjoro.

**7.8.** Ho Sinjoro, helpu min ke mi faru tion, kion mi devas fari hodiaŭ, ĉu tio estos malagrabla, ĉu konvena, ĉu mi emas fari tion aŭ tute ne. Ĝi nur plaĉu al Vi.

**8.8.** Patro nia, ofte mi ne komprenas Vin. Ni streĉu la atenton, por ke ni rimarku Vian intencon rilate nian kunhomon. Ni trovu la ĝustan sintenon.

**9.8.** Ho Sankta Spirito, penetru en mian animon tiel, ke la malbono mortos en mi kaj tiel ke la bono kresku kaj maturiĝu. Aliaj profitu pro tiu maturiĝo.

**10.8.** Ho Dio, mi dankas Vin pro Viaj benoj. Mia vivo portu fruktojn. Mi petas Vin, ke oni eĉ en tempoj de malĝojo kaj seniluziiĝo povos rikolti tiujn fruktojn. Mi ĉiam honoru Vin.

**11.8.** Ho Patro, rekonduku nin hejmen, se ni estas for de ĝi. Ni ne nur sopiru al la tera hejmo, sed ankaŭ al la ĉiela hejmo, kien Vi konduku nin post plenumo de nia vivotasko.

**12.8.** Ho granda Dio, Via kreitaĵo plenigas min kun amo kaj respekto. La naturo anoncas Vian gloron. Mi elkore dankas Vin, ke mi povas ĝui ĝin. Helpu nin agadi kontraŭ la detruo de ĝi.

**13.8.** Mia Majstro, sanktigu miajn lipojn, por ke ĉio, kion mi diros, estu dolĉa kaj saĝa kaj refreŝigos miajn kunhomojn.

**14.8.** Potenca Dio, mi dankas Vin, ke Vi volas donaci al mi Vian komunecon kaj kunecon. Parolu al mi, kiam mi ne parolas al Vi; venu al mi, kiam mi estas malproksima de Vi. Mi spertu Vian gracon, kiam mi ne atendas ĝin.

**15.8.** Patro nia, pekuloj trovu ripozon ĉe Vi. Lacaj koroj trovu Vian pacon. Fortigu laclacajn kaj ŝarĝitajn per Via forto. Ĉiuj akceptu Viajn donacojn.

**16.8.** Mia tasko ŝajnas al mi malvalora kaj neinda, kara Patro. Mi tamen restu fidela, mi serĉu Vian honoron kaj ne la mian. Mi tiam vidu, ke la plej malgranda tasko tamen apartenas al Vi.

**17.8.** Kompatema Patro, mi volas hodiaŭ pensi al ĉiuj, kiuj havas malĝojon. Vi estu kun Via konsolo ĉe ili, por ke ili rimarku la resanigan forton de Via ĉeesto. Helpu ankaŭ tiujn, kiuj perdis la kuraĝon. Ili tamen tenu la kredon kaj fidon en Vi.

**18.8.** Sankta Dio, mi scias min ĉirkaŭata de multaj geamikoj, pro kiuj mi dankas Vin. Sed multaj mem estas solecaj aŭ perdis amatan proksimulon. Konsolu ilin, Vi, la granda Konsolanto de la mondo, de la vidvinoj kaj orfoj.

**19.8.** Ĉiela Patro, pardonu ke mi silentis, kiam mi devis paroli, ke mi malobeis, kiam mi devis obei kaj ke mi ne aŭskultis al Vi, kiam Vi volis ion diri al mi.

**20.8.** Ho Dio, mi gloru Vin en ĉiu momento de tiu ĉi bela tago. La fruktoj de la bono, de la justeco kaj de la vero kresku en mi, kaj aliaj ĝoju pro tio.

**21.8.** Mia Dio, al ĉio venas fino. Helpu la infanojn, kiuj komencas denove la lernejan vivon. Helpu la geinstruistojn kaj la gepatrojn ĉe la edukado de la infanoj. Kaj Vi estu la Patro por tiuj, kiuj neniam havis patron aŭ kiuj perdis lin.

**22.8.** Kara aŭskultanta Sinjoro, mi dankas Vin, ke mi rajtas diri ĉion al Vi, ĉion, kio timigas min, kio maltrankviligas min, kio obsedas min. Vi ja aŭskultas al ĉiu, kiu sincere turnas sin al Vi, kaj balzamon Vi ĵetas en vunditajn korojn.

**23.8.** Mia Patro, mi dankas Vin, ke la Mateno de la Eterneco proksimiĝas. La longa nokto preterpasos. La malĝojo ĉesos kaj la larmoj, elverŝitaj sur ĉi tiu tero, ekbrilos kiel la roso ĉe la sunleviĝo.

**24.8.** Ho Dio, mia koro proklamu per pura sono Vian laŭdon. Forigu la fisonojn pro grumblado kaj plendado. Miaj lipoj kantu pri Via Majesto.

**25.8.** Mia Savanto, montru al mi Vian vojon. Estu proksima al mi, instruu min, lernigu min kiel mi devas vivi kiel kristano. Mi daŭre fiksu miajn okulojn sur Vin. Faru min bona lernanto de Vi. Mi kresku en Via graco.

**26.8.** Ho mia Patro, donu ke mia kredo ne ŝanceliĝu pro la kontaktoj kun alireligiuloj. Mi amu ilin kaj respektu ilin. Eble mi povas doni ion de la riĉeco de mia kredo en Vi, humile, sen fiero, tamen firma, sciante ke la saviĝo estas nur en Vi.

**27.8.** Kompatema Sinjoro, la fontanoj de la homa kompato alportu ĉie refreŝigon kaj konsolon. Forprenu la senamecon, kiu staras kiel muro inter la homoj. Via regno venu.

**28.8.** Mi volas laŭdi Vin pro Viaj bonfaroj. Ofte mi ne vidas ilin. Pardonu min pro tio. Dankon pro la geamikoj, pro la ĉiutagaj benoj, pro la suno kaj la pluvo. Mi akceptu ĉion el Via mano, Dio.

**29.8.** Mia Sinjoro kaj Savanto, donacu al mi Vian pacon. Vi scias, ke mi facile timas kaj ĉiu danĝero kaj bruego ektimigas min. Mi restu trankvila, fortigu min, mi petas.

**30.8.** Potenca Dio, la somero baldaŭ finiĝos, la kutima vivo denove komenciĝas. Helpu nin resti fidelaj por niaj geamikoj, por niaj taskoj, por la multe farenda laboro, kiun ni sen Via helpo ne povas plenumi. Estu kun la malsan-uloj kaj subtenu ilin en iliaj doloroj kaj suferoj kaj montru ankaŭ al ili la celon, por kiu ili vivas pro Via graco.

**31.8.** Kara kaj kompatema Patro, restu kun la gastoj, kiuj plenigis mian hejmon en ĉi tiu feria tempo. Benu ilin, kaj des pli, kiam iliaj vivcirkonstancoj estas ege malfacilaj. Via apudesto tamen donos ŝirmon kaj ĝojon.

**1.9.** Eterna Dio, la mondo fariĝas pli kaj pli malgranda. Ni povas rigardi trans la limoj de la landoj. Sed la muroj de la diversaj lingvoj staras ankoraŭ inter ni. Helpu nin forigi tiujn murojn per ama konatiĝo de unu internacia lingvo, Esperanto, por ke ĉiu komprenu unu la alian.

**2.9.** Ho Patro, helpu la homojn ĉe la ĉiutaga laboro, kiu ajn ĝi estu. Ni laboru kun ĝojo, ne ĝemante, ne plendante, nur pensante, ke ĉiu laboro estas necesa kaj tial ni ne malestimu ĝin.

**3.9.** Patro en la ĉielo, Via lumo konduku min tra ĉiu maltrankvilo de la vivo. Mi vidu mian vivtaskon en tiu lumo. Donu, ke ĝi brilu sur min en la valoj kaj sur la montoj, en feliĉo kaj male, en prospero kaj ĉagreno.

**4.9.** Mia Patro, estu kun mi, kien ajn mi iras. Kiam diversaj vojoj kuŝas antaŭ mi kaj kiam mi estas malcerta, kiun vojon mi devas elekti, montru Vi tiam la ĝustan vojon kaj helpu min promeni sur ĝi.

**5.9.** Mia Patro, liberigu mian koron de ĉia amareco. Kiam mi eble komencis ĉi tiun tagon en malafabla sinteno, forpelu tiam tiun sintenon per la suno de Via amo.

**6.9.** Mia Patro, mi deziras preĝi hodiaŭ por tiuj, kiujn mi facile forgesas. Mi preĝas por tiuj, kiujn mi ne amas. Gardu ilin kontraŭ miaj propraj sentoj; sanktigu miajn emojn. Donu al mi kompateman kaj puran koron.

**7.9.** Mia Sinjoro kaj Savanto, benu la homojn, kiuj laboras en sindonaj profesioj. Fortigu la flegistinojn kaj flegistojn, kapabligu la gekuracistojn kaj donu al ili amantajn korojn.

**8.9.** Sinjoro Dio, la laboro komenciĝas denove. Benu la ĉiutagan laboron, la kluban laboron, la porpacan kaj la eklezian laboron.

**9.9.** Kara Sinjoro, Vi promesis al la homoj Vian pacon. Mi ankaŭ ekkonu ĝin. Ĝi ekloĝu en mi. Mi ne estu kontenta kun la ĝojoj de la mondo, sed sopiru al Vi.

**10.9.** Ho Patro, aktivigu min por Via servo. Pro tiu servo mi servu al miaj kunhomoj. Mi ne preterpasu iliajn bezonojn, suferojn kaj dolorojn, sed malpezigu iliajn ŝarĝojn.

**11.9.** Patro de la granda kompato, mi neniam forgesu, ke mi estas infano de la graco. Donu al mi respondecon por ĉiuj homoj, kiujn mi renkontos sur mia vojo. Ankaŭ ili rimarku Vian apudeston kaj eksopiru al Vi.

**12.9.** Potenca Dio, fortigu mian kredon, mian esperon kaj mian amon. Mi kuraĝe promenu sur Via vojo. Mi apartenu al tiuj, kiuj ankaŭ amas Vin kaj konas sian vokiĝon kaj celon. Sed mi egale amu aliajn, kiuj ne konas Vin.

**13.9.** Mia Patro, forprenu de mi ĉiujn egoismajn pensojn kaj dezirojn. Faru mian koron plena de amo kaj tiel larĝa, ke ĉiuj miaj geamikoj trovos lokon en ĝi.

**14.9.** Patro de la komenco kaj fino, gardu la homojn en la densa trafiko. Forprenu la timon pro ĝi. Donu trankvilecon kaj respondecan senton al la kondukistoj de rapidaj veturiloj kaj donu, ke ĉiu atentu la alian kaj respektu unu la alian.

**15.9.** Mia Patro, donacu al mi la forton por esti pacienca. Liberigu min de ĉia ekscitiĝemo. Gardu min kontraŭ akraj, malafablaj vortoj, memamo kaj senameco. Mi servu aliajn, sen pensi al mi mem.

**16.9.** Eterna Dio, mi laŭdas Vin. Via justeco estas firma kiel la montoj. Mi dankas Vin pro Via fideleco. Ankaŭ la malluma nubo estas nur mantelo de Via graco.

**17.9.** Mia Patro, rigardu en granda kompato al mia pasinta vivo. Pardonu al mi miajn rompitajn promesojn, mian malrapidemon por Via servo kaj mian malgrandan sopiron al la vero. Helpu min denove sekvadi Vin.

**18.9.** Kara Sinjoro, mi dankas Vin pro la infanoj, kiuj ĉirkaŭas min. Mi dankas Vin pro la ĝojo, kiun ili alportas en la vivon. Mi dankas Vin pro la sunbrilo, kiu per ili ofte falas en lacajn, ĉagrenajn korojn. Mia koro ankaŭ restu per ili juna kaj gaja.

**19.9.** Kara Patro, helpu la gejunulojn, kiuj lernas kaj studas. Ili elektu tiun studadon, kiu plej konvenas je iliaj karakteroj kaj kapabloj. Fortigu ilin per Via spirito en la ofte malfacila kaj tenta studenta vivo. Ili estu fidelaj kolegoj.

**20.9.** Sankta Dio, mi pli estimu la sanktecon ol la oron. Mi kolektu trezorojn por la eterneco ne forgesante la terajn bezonantojn.

**21.9.** Patro en la ĉielo, benu la klopodojn de la homoj, kiuj aktive laboras por la paco. Ili trovu la ĝustajn metodojn, ekonomiajn kaj sociajn, por ke naskiĝu daŭra paco inter la homaro.

**22.9.** Sankta Patro, mi hodiaŭ atendu Vin. Mi ekkonu, ke Vi venas al mi en mia ĝojo kaj en mia ĉagreno, en la sunbrilo kaj en la mallumeco, dum la ripozo kaj dum mia laboro. Bonvenon, Sinjoro!

**23.9.** Kompatema Dio, mi laŭdas Vian fidelecon, per kiu Vi senĉese amas min. Pardonu al mi mian indiferentecon kaj malvarmecon. Renovigu la ligon kun mi. Faru min sincera kaj firmvola.

**24.9.** Ho Dio de la homoj, instruu al la homaro la sekreton de la veraj amo kaj paco. Forigu el la homoj la fieregon, la memamon kaj la malhumilecon. Faru la homojn infanoj de la paco.
Ili aŭskultu al la Princo de la paco.

**25.9.** Ho Patro, estu kun la homoj en la aŭtuno de la vivo. Ili ĝuu la bonaĵojn de la vivo post la plenumiĝo de la labortasko. Ili estu plenaj de danko pro la ricevitaj benoj.

**26.9.** Ĉiela Patro, helpu min vivi sur la ĝusta spirita alteco. Pardonu miajn ŝuldojn kaj mian indiferentecon. Mi ne rigardu de supre al miaj kunhomoj, sed mi staru apud ili en iliaj zorgoj, ĉagrenoj kaj suferoj.

**27.9.** Eterna Dio, Via graco malfermu en mia animo fonton de dediĉo. Liberigu min de ĉiu memamo kaj malsaĝa fiereco. En miaj pensoj estu loko por miaj gefratoj, kaj miaj agoj estu beno por ili.

**28.9.** Benu ĉiujn, kiuj festas ion hodiaŭ, kara amanta Dio. Ilia festo estu inda kaj je Via gloro. Ili ne forgesu danki Vin kiel la fonton de ĉiu festo.

**29.9.** Mia Patro, kiom ofte mi devas fuĝi for de la Deloganto; donu, ke mi trovu tiam rifuĝejon ĉe Vi. Fortigu min, kiam mi devas batali kun li.

**30.9.** Ĉiela Patro, ni dankadu Vin pro ĉiuj Viaj benoj. Dankon pro la bonaj novaĵoj kaj travivaĵoj. Dankon pro la geamikoj, kiuj bezonas nin. Benu ilin, Dio.

## Oktobro

**1.10.** Forta Dio, jam tri kvaronoj de la jaro preterpasis. Mi esperas, ke mi ne vane travivis ĉi tiun tempon. Nun mi rigardu al la tagoj, kiuj venos kaj ne plu rigardu malantaŭen.

**2.10.** Eterna Dio, mi ĝoju en la helpo de Vi kaj fidu en ĝi, por ke mia tuta vivo fariĝu unu granda laŭd-ario.

**3.10.** Ho Dio, renovigu la mondon per Via sankta spirito. Ekstermu per Via forto ĉiun vanecon kaj malharmonion el niaj koroj. Faru la homojn fratamaj kaj pur pensamaj. Ni estu unu pro la kredo en Kristo.

**4.10.** Eterna Dio, Via sankta spirito ekloĝu en mi. Ĝi regu min en ĉiaj cirkonstancoj kaj situacioj. Kompatu la bestojn kaj donu, ke la homoj pli amu kaj pli bone traktu ilin.

**5.10.** Plejpotenculo, laŭdata estu Via Nomo. Mi dankas Vin pro la lumo de la eterneco, kiu falas sur mia tera vivovojo. Mi ĝojas, ĉar mi ne nur ekzistas materie, sed ankaŭ Via Dia vivo estas en mi. Fajrero de ĝi ekflamigu miajn gekonatojn.

**6.10.** Kara Sinjoro, mi neniam forgesu, ke Vi vokis min. Sen Vi mi povas fari nenion. Mi ĉiam proklamu Vin per mia vivsinteno.

**7.10.** Ho Eternulo, faru min fidela en miaj devoj. Plenigu min hodiaŭ per kaj kun la spirito de la amo; tiam mia jugo estos dolĉa kaj mia ŝarĝo malpeza. Ke ĉiuj homoj vidu sian laboron en Via lumo.

**8.10.** Mia Patro, purigu denove mian koron de ĉia malbono, por ke mi vidu Vin. Mi helpu forigi la malbonaĵojn, kiuj estas en mi mem, en mia familio, en mia proksimeco kaj en la fora komuneco.

**9.10.** Hodiaŭ mi eble komencis malbone, ho Sinjoro. Pardonu min kaj lasu min denove komenci, nun kun Vi. Tiam la fino estos sankt-igata en Vi.

**10.10.** Patro en la ĉielo, mi laŭdas Vian Nomon. Vi estas tiel granda kaj potenca kaj tamen tiel proksima al mi. Mi dankas Vin, ke mi povas ĉion diri al Vi, ĉion, kio premas mian koron.

**11.10.** Kara Jesuo Kristo, mi volonte sekvas Vin. Tamen mi ofte forgesas tion, kio plaĉas al Vi. Helpu min pli pensi al mia proksimulo ol al mi mem.

**12.10.** Mia kara Sinjoro, mi estu ĉiam afabla. Mi ofte vundas iun senpripense per akraj vortoj aŭ eĉ per pripensitaj vortoj kaj sen-enhavaj vortoj. Mi pli kristane vivu.

**13.10.** Ho kompatema Dio, instruu al mi la veran kompaton. Mi sentu la ĉagrenon kaj la seniluziigon de miaj gefratoj, kaj mi trovu la ĝustajn vortojn por levi ilin al la ĝojo kaj espero kaj kredo, al la fido kaj kuraĝo kaj amo.

**14.10.** Kuraĝiga Patro, nur en Vi mi trovas la kuraĝon vivi sen armiloj kaj sen perforto. Helpu min konvinki la homojn por forĵeti la armilojn kaj kredi nur en Via potenco, por fondi tiel la regnon de la paco, justeco, amo kaj fido. En reciproka kompreno ni homoj laboru por Via Regno.

**15.10.** Viviganta Spirito, nur en Vi estas la vera vivo. Ni bone komprenu tion. Ekster Vi nia laboro estas vana. Benu tamen ĉiujn, kiuj ne konas Vin. Ni ne ĝenu ilin por ekkoni Vin.

**16.10.** Mia Patro, purigu miajn pensojn ĉe la komenco de ĉi tiu tago. Forprenu ĉion, kio estas malpura kaj nebula. Mia vivo estu irado al Via gloro.

**17.10.** Forta kaj potenca Dio, rigardu en graco al mia malforteco. Trafluu mian malpotencan koron per Via plena potenco. Mi venku en la batalo kontraŭ ĉia malbono.

**18.10.** Patro de la amo, mi preĝas por ĉiuj, kiuj ankoraŭ serĉas sian vojon en la mallumo. Ili trovu Vin. Ili sincere sopiru fari Vian volon, por ke ili vidu la lumon.

**19.10.** Eterna Dio, mi spertu hodiaŭ, ke mi vivas en la ombro de Via amo kaj graco. Sen timo mi daŭrigu mian vivovojon, renkonte al Vi kaj klopodante plenumi mian taskon kiel Via disĉiplo.

**20.10.** Ho Sinjoro, sanktigu miajn vortojn tiel, ke mia buŝo atestu pri Vi. Mia rilato kun aliaj homoj estu direktata de Via spirito de graco. Mia lango ne kaŭzu akcidenton, sed miaj vortoj estu balzamo por sopirantaj koroj.

**21.10.** Saĝa Dio, saĝigu min kaj miajn agojn, por ke ili gajnu la simpation de aliaj homoj. Tio estu valora por mi, pli ol mia propra praveco kaj honoro. Nur Vin mi laŭdas kaj dankas.

**22.10.** Sankta Patro, miaj plej intimaj pensoj apartenu al Vi. Mi ne kaŝu ion por Vi. Helpu min esti sincera. Mi amas Vin. Pri tio mi ne povas silenti, sed pri tio mi devas komuniki al aliaj.

**23.10.** Eterna Dio, mi laŭdas Vin. Via amo estas tiel vasta kiel la ĉielo, ĝi ĉirkaŭas ĉiujn homojn. Mi ĉiam spertu Vian kompatan ĉeeston.

**24.10.** Ho Sinjoro, kiam venas iom da ripozo en la ĉiutaga rapida vivo, ni danke akceptu tion. Ĝi estu kiel kuracilo kaj kiel rigardo en nian internon. Ĝi estu sanktigata en Vi kaj beno por ni.

**25.10.** Patro de ĉiuj infanoj, benu kaj subtenu la gepatrojn, kiuj havas mense malsanan infanon. Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

**26.10.** Ho amanta Dio, estu kun la homoj, kiuj vivas flanke de la socia vivo. Pro nia malatento ili ofte devojiĝis. Pardonu nin kaj kompatu ilin. Ankaŭ por ili estu loko en niaj koroj. Ni neniam malestimu ilin, sed dediĉante ilin al Vi, ni helpu, kie ni povas kaj kapablas.

**27.10.** Sinjoro, ni scias, ke ni dankas ĉion al Via graco por ni. Ni ĉiam memoru, ke estas pro Via boneco, kiam ni bonfartas kaj kiam ni povas fari niajn taskojn. Sed ankaŭ kiam ni ne bonfartas, vi estas apude.

**28.10.** Ho Dio, mi dankas Vin pro la beno, kiu eliras el bona muziko. Ĝi efikas sanige kaj pace. Donu al mi puran koron, por ke mi povu kanti kaj muziki je Via honoro. Ke aliaj estu edifaj per tio.

**29.10.** Eterna Dio, donacu al mi novan, viv-antan esperon. Mi hodiaŭ atendu grandajn okazontaĵojn, kaj mi fidu je la promeso de Via graco. Mi ĉie rimarku la mirindaĵojn de Vi.

**30.10.** Potenca Dio, benu nin per amo kaj paco. Ni hodiaŭ plenumu nian taglaboron kiel homoj, kiuj ŝuldas respondecon al siaj Sinjoro kaj Majstro. Ni ne laboru pro devigo, sed el amo je nia Dia Amiko.

**31.10.** Eterna Dio, pardonu al ni, ke ni disigitaj servas Vin en diversaj eklezioj kaj komunumoj. Reformu nin ĉiujn, forprenu niajn amatajn tradiciojn kaj vivigu nin. Ni aŭskultu al la Vivanta Vorto. Tiu Vorto kunigu nin.

## Novembro

**1.11.** Perfekta Dio, ni pensas kaj memoras pri tiuj, kiuj laŭ Via volo vivis kaj laboris, kaj ni admiras ilin. Ni dankas Vin pro ili kaj pro iliaj bonfaroj, kiuj estis inspiritaj de Vi.

**2.11.** Ĉiopova Patro, multaj antaŭiris nin en la ĉielan regnon. Ni dankas Vin pro ilia eterna feliĉo. Benu kaj konsolu la postrestintojn; helpu ilin por finpretigi la nefinitan laboron de siaj amatoj.

**3.11.** Amanta Dio, mi dankas Vin pro la kara patrino, kiun mi posedis, pro ŝia influo en mia vivo, pro ŝia kredo, amo kaj sindono.

**4.11.** Granda Dio, instruu min esti mildanima. En prospero mi ne fariĝu avara kaj dum seniluziiĝo ne amara. Helpu min resti afabla, grandanima kaj plenama, fidanta je Vi.

**5.11.** Mia Patro, mi dankas Vin pro ĉio, kion Vi kreskigas sur la tero. Tio nutru la malsatulojn. En la bonfartaj landoj oni ne prenu ĉion por si mem kaj kontraŭstaru la ordonojn por detrui superfluajn nutraĵojn, sed oni disdonu tiujn al la bezonantoj.

**6.11.** Mia Dio, mi preĝas al Vi por la forpelitoj kaj la forlasitoj. Mia koro estu plena de kompata amo, por ke mi serĉu la perditojn kaj montru la vojon al Vi. Ili trovu Vin, eble per mia ekzemplo. Vi regu mian vivsintenon.

**7.11.** Mia Patro, Vi forpelu el mi ĉiun penson, kiu ĝenas la ligon kun Vi kaj malebligas, ke mi amas Vin. Malfermu mian koron per kaj por Via graco, por ke mi ĉiun tagon laŭdu kaj gloru Vin.

**8.11.** Ho Sinjoro, mia Dio, kiun taskon Vi havas por mi hodiaŭ? Kion Vi deziras de mi? Malfermu miajn okulojn, por ke mi ekvidu Vian volon. Helpu min ne maluzi ĉi tiun tagon, sed donu, ke ĝi estu eterna gajno.

**9.11.** Sankta Spirito, kreskigu mian internan vivon. La dezerto en mi dolĉe floru. Mia senutila vivo fariĝu fruktodona en Kristo.

**10.11.** Mia Patro, gardu min kontraŭ la danĝeroj de la mondo kaj kontraŭ la pasio de senbrida kolero, avareco, egoismo kaj senameco. Anstataŭu tion per Via amo kaj saĝeco kaj paco.

**11.11.** Nobla Reganto de la mondo, ni pensas hodiaŭ al ĉiuj regantoj, al ĉiuj ŝtatoj, al ĉiuj popoloj, al ĉiuj unuopuloj. Nobligu ilin kaj donu al ili la sinceran sopiron al vera paco kaj interkompreno.

**12.11.** Estu, ho Patro, tie, kie nuntempe estas tre malluma kaj tre malvarma. Oni ne perdu la kuraĝon, sed Vi helpu por varmigi per amo kaj amikeco la korojn kaj por lumigi la mallumajn lokojn.

**13.11.** Ĉiela Patro, ĉio estas malfermita antaŭ Vi. Rigardu min en kompato kaj pardonu al mi ĉiujn miajn malbonajn farojn. Faru min sincera, tiel ke mi konfesu miajn pekojn. Mi malamu miajn pekojn.

**14.11.** Amanta Dio, forprenu de mi la malkontenton, la plendemon, la malamon, la malsinceron. Forprenu ĉian malbonon kaj helpu min disdoni la bonon de Vi.

**15.11.** Granda kaj amplena Dio, faru min granda: granda en amo, en humileco, en kompato, en fideleco, en justeco kaj en vereco. Faru min en ĉio alia malgranda.

**16.11.** Mia Sinjoro kaj Savanto, mi hodiaŭ partoprenu al Via kuneco, al Via forto, al Via ĝojo, al Via trankvilo kaj al Via paco.

**17.11.** Patro de ĉiuj homoj, mi neniam forgesu kion signifas Via granda Nomo. Kiam mi nomas Vin Patro, tiam mi devas ami ĉiujn Viajn infanojn. Ho, tro multe mankas al mi amo por aliaj. Nur Via amo estas kompenso. Mi transdonu Vian amon ĉie, kie mia amo ne sufiĉas.

**18.11.** Eterna Dio, nia piedo iru sur la vojo de Viaj ordonoj. Ili ja ne estas donitaj por malpermesi ion al ni, sed kiel kondukiloj. Via irbastono estu nia apogilo.

**19.11.** Ho Patro, konsolu la malsanulojn kaj tiujn, kiuj hodiaŭ mortos. Estu kun ili en la valo de la morto kaj konduku ilin en la etern an vivon. Restu kun la orfoj kaj la aliaj malĝojaj postrestantoj

**20.11.** Eterna Dio, ĉiun tagon mi estu ligita kun Vi. Ĉio, kion mi sopiras, estu sanktigata en Vi. La amo de Kristo plenigu ĉiujn miajn pensojn.

**21.11.** Dio de ĉiu kompato, montru al mi la riĉecon de Via amo. Liberigu min de ĉia egoismo. Estu loko en mia vivo por miaj gefratoj. Multaj lacaj pilgrimantoj trovu ĉe mi refreŝiĝon kaj konsolon.

**22.11.** Patro de la komenco kaj de la fino, tenu ĉiujn homojn en Via mano. Helpu, subtenu, gardu kaj ŝirmu precipe tiujn homojn, al kiuj daŭre okazas maljusteco. Ili trovu ripozon kaj pacon ĉe Vi. Ni daŭre laboru por la bonfarto de la homoj.

**23.11.** Patro, estas tiel mallume ĉirkaŭ mi. Mi ne scias kion fari. Venu en mian vivon, por ke mi kontraŭstaru la tentojn. Mi ne plu sentu la solecon, ĉar Vi apudestas.

**24.11.** Graca Dio, lumigu min per Via sankta Vorto. Mi komprenu, kion vi volas diri al mi. Tion mi transdonu al serĉantoj, demandantoj kaj konsolpetantoj, por ke ili feliĉiĝu.

**25.11.** Ho Patro, gardu la homojn, kiuj troviĝas sur la maro, en la aero, sub la terfaco. Ŝirmu ilin kontraŭ ŝtormo, ventego, fulmotondro, malvarmego kaj terskuo. Ili sentu sin sekuraj en Via mano.

**26.11.** Benu, ho kara Patro, tiujn, kiuj donas siajn plej bonajn fortojn, ja eĉ sian vivon por la proksimulo. Ili ja laboras por la plibonigo de la mizeraj vivcirkonstancoj de multaj homoj.

**27.11.** Denove mi petas Vian helpon, Sinjoro, dankante Vin samtempe pro Viaj bonagoj. Estu kun tiuj, kiuj malsatas, soifas, suferas, kiuj estas malliberaj aŭ rifuĝintoj, kiuj estas forgesitaj aŭ mortpafotaj aŭ mortantaj pro malsato, kie ajn ili troviĝas.

**28.11.** Mia Patro, mi aŭdu Vian voĉon, kiam Vi parolas al mi. Mi ĝoje respondu: jen, mi estas, Sinjoro. Se Vi vokas min por plenumi pezan devon, mi bonvole obeu. Helpu min preni kaj porti mian krucon kaj sekvadi Vin.

**29.11.** Patro, kiu amas min; mi trinku el la fonto de Via ĝojo. Tiu ĝojo trafluu min tiel, ke aliaj partoprenos al la ĝojo. Ke ili trovu denove ekvilibron en la vivo kun ties ĝojoj kaj malĝojoj.

**30.11.** Mia Patro, mi dankas vin pro ĉiuj, kiuj jam eniris en Vian ripozon. La firma espero je mia ĉiela heredaĵo prilumu mian teran laboron. Mi ne ripozu antaŭ ol mi estas farinta mian plej grandan eblon por mia kunhomo, por ke ankaŭ tiu ekkonu Vin kiel la Savanton de la mondo, en kiu estas eterna vivo.

**1.12.** La lasta monato de la jaro komenciĝas, ho Sinjoro; la monato de la memoroj, de la festoj, sed ankaŭ de la malĝojo pro malplenaj lokoj en la familia rondo. Helpu nin por travivi ĝin dece, danke, plaĉe al Vi.

**2.12.** Ho Patro, donu al mi la emon por tute dediĉi min al mia proksimulo, se tiu bezonas min. Amaj pensoj ĉirkaŭu la alian, kaj mi disdonu amon, amikecon, trankvilecon kaj fidelecon. Provizu min.

**3.12.** Patro de ĉiu bono, Vi ekipis min per multaj talentoj. Mi ne estu fiera, sed mi uzu tiujn humile por la feliĉo de aliaj. Penetru en ĉiun homan koron, ke oni uzu sian talenton, kiom ajn malgranda ĝi estas. Vi povas ja uzi ĉion kaj ĉiun.

**4.12.** Amplena Sinjoro, kompatu Vian kompatindan mondon. La homaro ne povas vivi sen Vi. Rigardu ame tiujn, kiuj en aliaj religioj trovas feliĉon. Via graco estas ja tiel granda.

**5.12.** En multaj landoj, ho Sinjoro, estas hodiaŭ familia festo. Tamen regu la simpla amo kaj ĝojo, kaj ne la sopiro al luksaĵoj. Ni ne forgesu tiujn, kiuj vivas sen familio kaj sen bonaj vivrimedoj.

**6.12.** Patro nia, ĉe Vi estas la fonto de ĉiu vivo. Kiam ni forgesas tion, tiam niaj vivoj fariĝas senakvaj kaj senvivaj. Ni ĉiam denove iru al la fonto kaj trinku la akvon de la vivo.

**7.12.** Sankta Spirito, la burĝono de mia kredo ne velkiĝu, sed ekfloru ĝis pleneco, je Via gloro. Mi sciu, ke mi havas respondecon por miaj gefratoj kaj gekonatoj, ĉar mi estas ambasadoro de Vi.

**8.12.** Potenca Dio, ŝanĝu la korojn de la subpremantoj. Ni laboru saĝe, aktive kaj ame, por ke la subprematoj ricevu liberecon kaj justecon. Ni havu respekton kaj konsideru la vivon de la alia pli valora ol nia propra.

**9.12.** Patro nia, ĉe Vi estas la fonto de ĉiu vivo. Kiam ni forgesas tion, tiam niaj vivoj fariĝas senakvaj kaj senvivaj. Ni ĉiam denove iru al la fonto kaj trinku la akvon de la vivo.

**10.12.** Patro de la amo, la pliaĝuloj helpu la gejunulojn, kiuj protestas kontraŭ la maljusteco, ekzemple kiam popolo ekstermas alian popolon per ĉiaj rimedoj.

**11.12.** Ho, estu bonvena, Jesuo Kristo. Ni tutkore bonvenigas Vin. Mia koro sopiras al Via veno. Mi ne komprenas, kial Vi volas veni en nian terure mizeran mondon. Sed Via Patro diras, ke Vi volas savi nin.

**12.12.** Eterna Dio, helpu la novan generacion vivi inter tiom da diversaj junuloj, kiuj ne plu konas la kristanan vivostilon. Helpu junajn geamantojn respekti unu la alian, por ke ili trovos la plenan feliĉon en la geedziĝo.

**13.12.** Ho Dio, riĉa en kompato, mi preĝas por la perditoj, por la vagantoj, por la rifuĝintoj kie ajn, por tiuj, kiuj ne estas akceptataj. Pretigu multajn korojn por helpi ilin. Vi mem konduku ilin al Via patra koro.

**14.12.** Baptu nin, ho Patro, per la sankta spirito. Malplenigu nin, por ke ĝi ekloĝu en ni. Ĝi regu niajn agojn kaj niajn pensojn, niajn vortojn kaj laborojn.

**15.12.** Kara Kreinto, ni dankas Vin pro la majstro Zamenhof, kiun Vi inspiris verki la internacian lingvon. Per ĝi ni nun estas ligitaj en preĝoj, kie ajn ni loĝas. Mirinda, genia eltrovaĵo ĝi estas; inspiru nin disvastigi ĝin.

**16.12.** Ho Patro, Vi ĝojas, kiam Via infano estas feliĉa. Ĝia feliĉo estu sincera kaj trans-donata al aliaj. Vi estu dankata kaj honorata pro ĉi tiu tago.

**17.12.** Ho amanta Dio, mi neniam hontu por konfesi Vin antaŭ aliaj homoj, ankaŭ se ili mokas pri Vi. Mi vivu kiel ekzemplo laŭ Via Evangelio.

**18.12..** Ho Sankta Spirito, Spirito de la kompato, elverŝu Vin super ĉiujn homojn. Liberigu ilin de timo kaj eraro kaj levu ilin al la vojo de la lumo kaj de la vero.

**19.12.** Mia Patro, prenu min denove en Vian kuneston. Gardu min kontraŭ indiferenteco kaj ekstera, surfaca aŭ ekstrema religiemo. Per Via venkanta forta amo mi restu firme kaj intime ligita kun Vi.

**20.12.** Riĉa Dio, Patro de la malriĉuloj, kompatu ilin. Montru al ni vojojn kaj rimedojn por forpreni ilian malriĉecon. Pardonu al ni, se ni ĉiam unue pensas pri ni mem kaj ne honeste dividas ĉiujn Viajn terajn abundaĵojn.

**21.12.** Dio de ĉiu graco, Via spirito penetru en la plej profundajn kaŝangulojn de mia animo. Nenion mi proprigu al mi, sed mi transdonu mian individuecon al Vi. Akceptu ĝin.

**22.12.** Kara Patro de ĉiuj homoj, kiam ni estas okupataj sendi bondezirojn al geamikoj en la tuta mondo, akompanu tiam la sendaĵojn kaj benu la ricevontojn. Ni preĝu por tiuj, al kiuj neniu pensas.

**23.12.** Jam alproksimiĝas la Kristnaskfesto. Benu, ho Kreinto, ĉiujn homojn, ankaŭ tiujn, kiuj neniam aŭdis pri la naskiĝo de Via Filo, kaj tiujn, kiuj ne povas kredi, ke la Bebo en la staltrogo estas Via Filo, naskita de la Virgulino Maria, kiun Vi elektis kiel Lian Patrinon. Dankon pro ŝia sindono!

**24.12.** Gloron al Vi en la supera alto! Kiam ni estas kune en la Sankta Vespero, silentigu tiam la bruon de la mondo, de la militoj, de la densa trafiko kaj de niaj ribelantaj koroj. Paco, amo kaj adoro venu anstataŭ la bruado.

**25.12.** Hodiaŭ ni memoras, ho Patro, ke Via Filo naskiĝis por ni kaj venis kiel infaneto en la mondon. Ni ne festu tiun feston romantike aŭ tradicie, sed ni pensu al Via vera intenco: Vi sendis Vian Filon por savi nin kaj ŝanĝi niajn korojn. Ni dankadas Vin!

**26.12.** Kompatu la bestojn, ho Kreinto, kiuj devas suferi en ĉi tiuj tagoj, por ke la homoj manĝu delikate! Pardonu al ili tiun kutimon kaj ŝanĝu ĝin en bonon kaj por la homoj, kaj por la bestoj, ĉiuj ja estas kreitaĵoj de Vi.

**27.12.** Patro de ĉiu graco, la lumo de la naskiĝo de Via Filo lumigu la homaron. Ni portu al Li nian incenson, mirhon kaj oron, tio estas: nian koron, volon kaj amon.

**28.12.** Reĝo de la gloro, mi ekkonu Vin ĉie, kie mi helpas miajn kunhomojn. Ke ili vidu Vin per mi; mi ne ĝenu ilin. Iru kun ni ĉiuj baldaŭ trans la sojlon de la malnova al la nova jaro.

**29.12.** Kara Jesuo, la kantoj honore je Via naskiĝo ankoraŭ resonas en ni: Gloro al Dio kaj paco sur la tero. Ke Vi donu la veran pacon en la mondo kaj en niaj koroj. En nia malforteco ni volas helpi Vin por realigi tiun pacon sur la tero. Faru nin saĝaj kaj benu nian laboron rilate tion.

**30.12.** Kara ĉiela Patro, ofte estas malfacile preĝi, kolekti kaj koncentri niajn pensojn. Ofte estas nur petado kaj demandado. Tamen ni scias, ke Vi komprenas niajn stultajn demandojn. Ni volas laŭdi Vin kaj danki Vin pro Viaj grandaj faroj. Ni volas aparteni al Vi kaj dediĉi nin kaj ĉiujn aliajn homojn al Vi, ĉar en Via mano ni estas sekuraj kaj trankvilaj. Restu eterne ĉe ni, ho amanta Dio.

**31.12.** Ho Eternulo, ni dankas Vin, ĉar ankaŭ en la fino de la tera jaro Vi estas ĉe ni. Pardonu al ni ĉion, kio estis malbona. Benu ĉiujn kaj benu ĉion, kio plaĉis al Vi. Ni dankadas Vin. Konsolu la solulojn.

Amen.

**Karaj gelegantoj,** 

Mi dankas vin, ke vi volas preĝi kun mi kaj tiel esti unu en pensoj kaj spirito.

La preĝoj helpu vin trovi la personan kontakton kun la Sinjoro de la mondo.

Fortigita per tiu kontakto, vi povu fari Lian volon, disvastigi la interkomprenon, la kristanan amon, la ekumenan movadon, la universalan pacon, la justecon kaj la veron, la homajn rajtojn, la toleremon en frata kompreno por alipensantoj kaj alikredantoj, labori por la plibonigo de la vivocirkonstancoj de ĉiuj homoj, kiuj nun ankoraŭ vivas malliberaj, sen rajtoj, sen manĝaĵo, sen loĝejoj, sen amo kaj egaleco, en teruraj diskriminacioj kaj militoj.

Mi invitas vin tutkore partopreni en ĉi tiu preĝo-ĉeno ĉirkaŭ la mondo, por tiel esti ligitaj unu kun la alia kaj kune kun la Sinjoro, kiu instruis al ni la plej perfektan preĝon.



**PATRO NIA,**



kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo,
venu Via regno,
fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo,
tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan
donu al ni hodiaŭ,
kaj pardonu al ni
niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas
al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku
nin en tenton,
sed liberigu nin
de la malbono,
ĉar Via estas la regno,
kaj la potenco,
kaj la gloro, eterne.

AMEN.

La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo
kaj la amo de Dio
kaj la kuneco de la Sankta Spirito
ESTU KUN VI ĈIUJ.

# Biografieto de Jelly Koopmans-Schotanus, Nederlando

Naskiĝis 16-12-1919 en Nijehaske (provinco Frislando)
Edziniĝis 12-04-1950 en Hilversum al Wim Koopmans
(nask.1918 Hilversum – mort. 2006 Oosterbeek)
Naskis 4 infanojn: Benata (1951), Donita (1954), Feliĉa (1956) kaj Espero (1957)
Mortis 17-11-1998 en Arnhem (loĝante en Oosterbeek)
Loĝis en Nijehaske, Heerenveen, Leeuwarden, Hilversum, Didam, Leiden, Rotterdam kaj Oosterbeek



Esperantiĝis

en Hilversum en 1947, partoprenis Universalajn, KELI kaj Ekumenajn Esperanto Kongresojn ekde 1949. Aktivis kiel solkantistino, predikantino, prelegantino, organizantino de Esperantaj tagoj kaj semajnfinoj, gvidantino en Internaciaj Infanaj Kongresetoj, k.t.p.

Profesia laboro

Diplomita apoteka helpantino en Leeuwarden (1939-1941), Sekretario de la Inspektoro por la Popola Saneco en Leeuwarden (1941-1946), profesia kantistino en koruso ĉe la kristana radio-unuiĝo en Hilversum (1946-1948), diplomita apoteka helpantino en Weesp (1948-1950), eklezia laborantino en reformita komunumo en Leiden (1970-1976), Pastora laborantino en prizorgejo/flegejo en Rotterdam (1991-1992).

**31.7. Ho Patro en la ĉielo**, mi kore dankas Vin pro la granda beno, kiun donas **la internacia lingvo Esperanto** al la homaro. Tamen multaj homoj ne volas lerni ĝin pro nekomprenebla antaŭjuĝo. Helpu nin disvastigi ĝin, por ke ĉiam pli da homoj eklernu ĝin kaj spertu ĝian grandan valoron rilate la interkompreniĝon de ĉiuj homoj, kie ajn ili loĝas.

**5.8. Mia Sinjoro**, mi dankas Vin pro la multaj benoj, kiujn mi ricevadas de Vi. Mi dankas Vin pro la **lingvo Esperanto**, per kiu mi spertadas tiom da bono, per kiu mi ricevas tiom da geamikoj, kaj per kiu mi havas pli intiman kontakton kun Vi.

**1.9. Eterna Dio**, la mondo fariĝas pli kaj pli malgranda. Ni povas rigardi trans la limoj de la landoj. Sed la muroj de la diversaj lingvoj staras ankoraŭ inter ni. Helpu nin forigi tiujn murojn per ama konatiĝo de unu **internacia lingvo, Esperanto**, por ke ĉiu komprenu unu la alian.

**15.12. Kara Kreinto**, ni dankas Vin pro la majstro **Zamenhof**, kiun Vi inspiris verki la internacian lingvon. Per ĝi ni nun estas ligitaj en preĝoj, kie ajn ni loĝas. Mirinda, genia eltrovaĵo ĝi estas; inspiru nin disvastigi ĝin.

**<u>Kristana Esperantista Ligo Internacia</u>**
(KELI)
eldonis ĉi tiun libreton por subteni
**<u>EVIDENTE:</u>**

**Evidente** estas fondaĵo, kiu nomiĝas nacilingve
**Stichting Zienderogen**
(Fondaĵo Vidantaj Okuloj)

Pli ol 40 jarojn de sia vivo **Jacques Tuinder**, NL, dediĉis al la batalo kontraŭ nenecesa/ evitebla blindeco en la mondo. Kiel kristano instigis lin Jesuo, kiel esperantisto la okulisto Zamenhof. La unua nomo de la agado estis

**E3**: **<u>E</u>**sperantistoj **<u>E</u>**sperigas **<u>E</u>**sperantojn.

Intertempe la plej granda parto de la esperigantoj ne parolas Esperanton. Tamen en la nunaj nomoj vi retrovas la tri E:

**<u>E</u>**-vid-**<u>E</u>**-nt-**<u>E</u>**
ZI-**<u>E</u>**-ND-**<u>E</u>**-ROG-**<u>E</u>**-N

Pli da informoj en DR 6/2007 aŭ sur la ttt-ejo de KELI:

**http://www.chez.com/keli**

**Ricevintoj aŭ legintoj de la preĝlibreto povas donaci al:**

**Stichting Zienderogen** / **Evidente** en Heemskerk, NL

**Postbank N.V.**, 6800 XP ARNHEM, NL, konto-n-ro 10.20.100
**IBAN:** NL 69 PSTB 0001 0201 00
**BIC:** PSTBNL21.

**UEA-konto** de Jacques Tuinder: **jajt-s**.

Adreso de Jacques Tuinder por sendi monon en koverto:

**Stichting Zienderogen** / **Evidente**
**Henegouwenlaan 35**
**NL-1966 RH Heemskerk**